der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

26. Jahrgang | Nr. 159 (1/1990) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Pri la estonta agado de nia asocio

GDREA en alia lando

1. Jes, alia lando. Tio, kion ni nomas Germana Demokratia Respubliko, ne plu estas tio, pri kio mi skribis en „der esperantist" 3/89. Ekde januaro '89 mian landon forlasis pli ol tricent mil homoj (300 000). Apenaŭ pasis la senguste organizita pompa jubilado okaze de la 40-jariĝo de mia lando (aŭ fakte jam dum jubileo), longe bruletinta krizo plene ekflamis. La popolo per potencaj demonstracioj forbalais la malnovan politburoon de la partio, la registaron kaj ĉiutage eldevigas novajn ŝanĝojn. Kaj kiam vi legos ĉi tiujn liniojn, denove multo ne plu veras. Mi nun scias, ke mi eraris supozinte la registaron kaj partigvidantaron de mia lando honesta. La politburoo konsistis plejparte el krimuloj trompintaj la popolon kaj la propran partion, ankaŭ min.

Mi nun scias, ke mi eraris, supozinte, ke perestrojko kaj glasnosto venos al GDR sen tro da neceso purigi la propran domon. La domo estis pli malpura ol mi kredis.

La gvidantaro de la partio, en nemezurebla grado, piedtretis la idealojn de la socialismo, misuzis sian potencon kaj la fidon de multaj bonvoluloj, kondukis la landon ĝis la rando de katastrofo.

Mi nun scias, ke ne gvidis „la laborista klaso, en alianco kun kamparanoj kaj intelektularo", kiel mi skribis, sed gvidis privelegiojn-avida kliko de krimuloj (mi petas pardonon pro la ripetiĝo, sed mankas al mi alia vorto), de krimuloj nekompetentaj pri tio, kion volis Marx, Engels, Lenin. Necesas nova komenco!

2. **Tamen:**

Estas nepretervideble, ke en GDR montriĝis vera la aserto pri la potenco de la popolo.

Kaj oni ne aŭdas, ke la socialismo fiaskis. Ĝi ne povis fiaski, ĉar ĝi ne ekzistis. Ni nun disbatas la stalinismon, en sia GDR-a varianto. Do — ni revenu al Marx, Engels, Lenin. Estus bone. Almenaŭ ŝajne ekzistas granda komuna interkonsento inter la multaj novaj grupiĝoj kaj partioj en la tute ŝanĝita socia pejzaĝo de GDR, ke oni ja volas socialismon, sed veran, modernan, novan.[1]) Kiu scias, kio tio estas! Mi fariĝis singarda pri rapidaj difinoj . . . Almenaŭ mi ĝojas, ke mi retradukis la Manifeston aperontan en 1990 ĉe la eldonejo „Progreso" en Moskvo . . .

Multaj ŝanĝoj rapide okazis: tute nova enhavo de la amaskomunikiloj, tute absoluta vojaĝlibereco, stimulado de kreaj fortoj de la popolo, ŝanĝoj en la popolkleriga sistemo, en la

kulturpolitiko, ekonomio, juro, pozitivaj ŝanĝoj en la rilatoj al Soveta Unio („Sputnik" reaboneblas!) kaj al FRG.
Ni esperu, ke nia lando leviĝu el la krizo, gvidata de honestaj kaj kompetentaj homoj. Jes, ni esperu, sed ni ankaŭ kunlaboru kaj kunkontrolu!

3. Kaj GDREA en tiu alia lando? En la nuna kaj estonta GDR?
Ankaŭ GDREA devos ŝanĝiĝi jam pro la ŝanĝiĝintaj eksteraj cirkonstancoj.
Ankaŭ Kulturligo de GDR diskutas pri sia estonteco. Certe, ĉi tiu organizo ĉiam estis sufiĉe liberala, havis akceptéblan spiritan klimaton. GDREA bone lokiĝas en ĝi kiel ĝia parto. La atmosfero kaj laborprincipoj en GDREA funkciis jam antaŭ „la nova epoko" kaj ne devas esti draste ŝanĝitaj. Ĉiam regis vigleco kaj kunlaboremo. Sed aperas minaco. Minaco estus la plena disiĝo de GDREA de Kulturligo. Tiam, sen sufiĉa materia bazo, sen ejoj de Kulturligo, sen financa subteno, la asocio ŝrumpiĝus al sensignifeco. Sed mi estas optimisma rilate la novprofiliĝon kaj pluekziston de Kulturligo — kaj de GDREA en ĝi.
Pri enkonduko de novaj labormetodoj en la agadon de sia Centra Estraro ĝiaj membroj jam ekdiskutis dum 1988 kaj daŭrigis dum la 4-a kaj 5-a plenkunsidoj en 1989. Konsiderante tiujn diskutrezultojn kaj aliajn vidpunktojn (i. a. spertojn el la UEA-agado), mi proponas al plua diskuto jenajn tezojn:

a) GDREA devas redifini siajn celojn kaj labormetodojn ellaborante i. a. statuton- kaj programdokumenton. La malfermiĝo de GDR al la mondo supozigos pli grandan lingvopolitikan konscion pri eventualaj valoroj de Esperanto en nia lando. La intereso por la lingvo verŝajne kreskos.

b) Per plialtiĝo de la respondeco de la Centra Estraro kaj ĝia Prezidio necesas pligrandigi la memstarecon de la asocio en Kulturligo, samtempe estos pli da memstara agado de la unuopaj estraranoj. Necesas trovi elastan sistemon por ebligi pli facilan eniron de novaj talentuloj en la gvidsistemon. Tio povus i. a. okazi per pli oftaj elektoj kaj la sistemo de „Komisiitoj de la Centra Estraro", komisiitoj ekz. por kluba agado, kvalifikado, amaskomunikiloj,lingva kontrolo, financoj, publicado, kulturo, sociaj partneroj, turismo, historiografio k. a. La komisiitoj laboru relative memstare formante taŭgajn komisionojn.

c) La gvidsistemo de GDREA devas ebligi pli bonan kontentigon de specifaj interesoj (ekz. de kristanoj),

d) Necesas sisteme okupiĝi pri enspezado de financaj rimedoj, aspekto ĝis nun sufiĉe netraktita. Memfinancado relative sendependa sur ĉiuj ebenoj devas esti ebla, kvankam espereble ne la sola ekzistobazo. Devas helpi ekonomiaj stimuloj.

e) La novaj vojaĝeblecoj por civitanoj de GDR, fakte sen iu ajn limigo flanke de la ŝtato, kreas absolute novan situacion por la tuta asocio. La membroj spertiĝos internacie, kontribuos pli konkrete al la monda movado, partoprenos ĝin aktive. Tio postulas de GDREA decide pliaktiviĝi kiel aliĝinta landa asocio en UEA kaj TEJO kaj starigi rilatojn kun multaj aliaj asocioj, fakaj kaj nefakaj. Fariĝos normalaĵo, ke esperantistoj el GDR — depende de la valutaj eblecoj kaj de havataj amikoj — partoprenos kongresojn, seminariojn kaj aliajn aranĝojn en nesocialismaj landoj, kie ili ĝis nun ege maloftis (kvankam ankaŭ ĉi-rilate pro la helpo de Kulturligo ekde 1988 io moviĝis antaŭen). La asocio devas decide helpi al siaj membroj, orientiĝi en la monda Esperanto-movado. Grava tasko ankaŭ por „der esperantist".

f) Kompreneble fariĝos normalaĵo, ke pli da eksterlandanoj partoprenos la publikajn aranĝojn en GDR.
Tio verŝajne validas aparte por esperantistoj el FRG. Kompreneble estus tre dezirinde, ke reprezentantoj de GEA kaj GDREA iam kunvenos por trakti pri eblecoj de kunlaboro. En Berlin, inter la grupoj, tio certe jam funkcias.

g) Ni tamen ne forgesu sisteme pliprofundigi niajn tradiciajn rilatojn al la esperantistoj el la socialismaj landoj, konsiderante, ke ankaŭ en tiuj

landoj la plibuntiĝo de la socia situacio plibuntigos la Esperanto-movadon, kion oni povas vidi aparte draste en Soveta Unio.

h) Jam komence de la jaro 1989 GDREA engaĝiĝis por la disvastigo de la libro de Ulrich Lins „La danĝera lingvo". Do, temas pri kuraĝa alfronto al la „blankaj makuloj" en la historio de Esperanto. Jam 1987 kaj 1988 Erich Würker kaj Ludwig Schödl prelegis dum la renkontiĝoj de iamaj membroj de LEA pri la stalinisma rilato al Esperanto ekde 1948 en la sovetia zono kaj posta GDR. Ni devas sisteme kaj tute sincere skribi la historion de Esperanto en GDR antaŭ la jaro 1965, la refondiĝo.

Konsiderante la malkovrojn pri la stalinismo kaj akceptante, ke ĝi ja havis influon al la sovetia kaj alilanda proleta Esperanto-movado, ni verŝajne devas rekonsideri niajn pritakson kaj rilatojn al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Kompreneble ni abunde prezentos la libron de Lins en unu el la sekvaj numeroj de nia organo.

i) Depende de espereble nova „paperpolitiko" en GDR, GDREA devas havi eldonpoitikon. Pro kronika papermanko mankis ĝis nun eldonpolitiko, logike.

j) La fundamentaj rekonsideroj de la lerneja politiko inkludo snovan aliron al la instruado de fremdaj lingvoj. Eble ĉi tie kuŝas certa ŝanco pro Esperanto kiel objekto de instruado en lernejoj kaj altlernejoj. Ni konsideru tamen, ke sukcesoj nur venas, se disponeblas taŭga scienca kaj instrua materialoj kaj kvalifikitaj instruistoj.

k) Konservante la unuecon de la asocio kaj la ĝisnunan harmonion inter la generacioj, ni tamen konsciu, ke la junularo bezonas pli grandan memstarecon. Ĝi pli memstare planu kaj realigu siajn aktivecojn. La junuloj memstare elektu siajn gvidorganojn kaj vere lernu kaj spertu demokration kaj respondecon.

Jen kelkaj nekompletaj ideoj, ofte kolektive prezentitaj. Cetere, ni lernu ankaŭ de UEA. Jam en 1988 la Centra Estraro de GDREA diskutis pri la Strategia plano de UEA. Lastjare aperis signife prilaborita nova versio. Ankaŭ pri ĝi oni jam diskutis en GDREA.

La teksto baldaŭ aperos en „der esperantist" kaj certe stimulos novajn ideojn por la agado de GDREA. Amasan spertinterŝanĝon pri la estonta agado ni antaŭvidu kadre de la 5-a Centra Renkontiĝo dum majo 1990 en Brandenburg.

Do, kara leganto, kompletigu la tezojn, subtenu aŭ polemiku, rifuzu aŭ proponu! La diskuto estos malfermita.

D. Blanke

[1]) Tiujn liniojn mi skribis dum novembro 1989. Nun, meze de februaro 1990, apenaŭ iu parolas pri „nova socialismo". La vorto mem ŝajne malaperis ĉe la plej multaj partioj, grupiĝoj kaj organizoj. Levas la kapon naziismo, ekzistas granda deziro pri unuiĝo de GDR kun FRG, kaj regas eble nescio pri la sekvoj. Tamen, ni daŭrigu nian multflankan agadon por Esperanto. Ŝancoj ja ekzistas.

Reaperos klasikajo

La Komunista Manifesto de Karl Marx kaj Friedrich Engels aperos en nova Esperanta traduko de Detlev Blanke en la eldonejo „Progreso", Moskvo. La 80-paĝa grafike aranĝita libreto kostos ĉirkaŭ 5 markojn.
Antaŭmendojn akceptas GDREA.

Jugendkongreß in Kuba

„Jugendtourist" ist weiterhin bereit, eine Gruppe von 30 Jugendlichen zum Internationalen Esperanto-Jugendkongreß in der Schweinebucht (Kuba) zu entsenden und zu subventionieren. Etwa 3 000,— Mark für Kongreß und touristisches Programm (19. 7. bis 2. 8. 1990) sind ein großzügiges Angebot. Interessenten melden sich bitte beim Zentralvorstand!

Senpage ricevebla

„Paco"-eldonoj de GDR 1989 kaj de Japanio 1989, nur por abonintoj de „Paco".

Por vojaĝemuloj

Tre ampleksa listo de Esperanto-aranĝoj en la tuta mondo estas havebla ĉe la Centra Estraro (kopio el „Die rationelle Sprache" 5—6/89).

La 5-a plenkunsido de la Centra Estraro

Ĝi okazis de la 2-a ĝis 4-a de novembro 1989 en Karl-Marx-Stadt. La tagordo kompreneble estis influita de la perestrojko de GDR kaj pro tio dediĉis grandan atenton al jenaj 3 demandoj: Kiujn problemojn la ŝanĝoj alportos al a) Kulturligo, b) al GDREA rigarde al novaj ŝancoj, c) al GDREA rigarde al la propra celaro, funkciado kaj gvidagado.

Pri kelkaj aspektoj ni esprimis nin en aparta artikolo ĉi-numere. Krom tio la estraranoj aŭskultis superrigardon pri la agado de GDREA ekde la 4-a plenkunsido (9. — 11. 2. 89), raportojn pri la ĉi-jaraj kongresoj kaj aliaj aranĝoj, la preparo de la 5-a Centra Renkontiĝo de GDREA 1990, la junulara agado, „der esperantist" kaj aliaj problemoj. La Centra Estraro principe akceptis la novan laborplanon por 1990 kun la necesaj ŝanĝoj diskute menciitaj kaj eventuale atendataj. Valoras mencii, ke vespere, la 2-an de novembro, **Ulrich Becker** prelegis lumbilde pri siaj travivaĵoj kadre de la Monda Festivalo de la junularo en Pjongjang/Norda Koreio. La 3-an de oktobro, vespere, la konata sovetia esperantisto **Leo Vulfoviĉ** el Moskvo prelegis pri la aktuala Esperanto-movado en Sovetunio. Kaj sabate la 4-an de novembro, parto de la Centra Estraro diskutis pri la nova Strategia Plano de UEA.

Estas planite, publikigi la planon en „der esperantist", tiel diskonigante la interesan materialon al la membroj de GDREA kaj samtempe komentante kelkajn aspektojn.

La Centra Estraro distingis 12 membrojn okaze de la jubileo de GDR pro bonege farita laboro.

Per minuto de silento la Centro Estraro omaĝis al la forpasinta iama sekretariino **Ilse Serowy.** La Centro Estraro per florbukedo dankis **Ruth Schonert** pro 18-jara fidela laboro en la oficejo de GDREA. Oni liberigis laŭ propra deziro **d-rinon Ingrid Erfurth-Darmann** el sia funkcio, ĉar ŝi edzinĝis kaj nun loĝas en Francio. La sekvaj kunsidoj de la Centra Estraro de GDREA okazos

— 18. — 20. 1. 1990 en Neubrandenburg
— 3. — 5. 5. 1990T en Magdeburg
— 11. — 13. 10. 1990 en Eisenach.

Ĉiuj membroj de GDREA estas alvokitaj fari realigeblajn proponojn por la pluevoluigado de la Esperanto-movado en GDR sub la ŝanĝiĝintaj sociaj kondiĉoj. Ĉiu ideo estas bonvena. Oni sendu la proponojn al la oficejo de GDREA. Parto el ili estos publikigotaj sur la paĝoj de „der esperantist".

D. B.

Distingoj

Okaze de la jubileo de GDREA, kadre de la 5-a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA jenaj estraranoj estis distingitaj per honordokumentoj kun subskriboj de la prezidanto kaj vicprezidanto de Kulturligo respektive per libroĉekoj: Michael Behr, Thorsten Lemke, d-ro Till Dahlenburg, Helmut Krone, Torsten Bendias, Peter Bartos, Joachim Schulze, Fritz Wollenberg, d-ro Sabine Fiedler, Hans-Joachim Borgwardt, Klaus-Dieter Dungert, Werner Habicht. Per tio nature ne finiĝus la listo de la distingindaj ... Ni kore gratulas.

la redakcio

Kongresa Rezolucio

Egaleca komunikado je alta nivelo fariĝas monda prioritato

La 74-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Brajtono, Britujo, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1989, kun 2 265 partoprenantoj el 55 landoj kaj konsiderinte la kongresan temon „Lingvo kaj egaleco en la internacia komunikado", nun venas al la jenaj konkludoj:

1. Neniam antaŭe estis tiel granda bezono de efika komunikado inter la

homoj. La grandaj problemoj de milito kaj paco kaj de la homa ĉirkaŭaĵo bezonas tujan kaj profundan pritrakton, se la homaro deziras eviti kompletan kolapson de la biosfero.

2. Regas en la mondo kreskanta deziro inter ordinaraj homaj partopreni tiun debaton kaj konatiĝi kun la opinioj kaj ideoj de tiuj en aliaj landoj. Tiun procedon nutras la plivastiĝo kaj pliefikiĝo de la komunikada teknologio. Ĝin akompanas deziro trakti tiujn demandojn en spirito de egaleco.

3. La lingva problemo prezentas gravan obstaklon al tiu ĉi kresko de la deziro komunikiĝi. Malgraŭ grandegaj elspezoj de tempo kaj mono en la diversaj landoj, precipe en la edukaj sistemoj, sed ankaŭ en komerco kaj en aliaj medioj, la granda plimulto de la homa enloĝantaro ne kapablas uzi unu el la grandaj, internacie disvastigitaj lingvoj. Eĉ tiuj homoj, kiuj lernis ilin en lernejoj, kutime ne kapablas bone ilin kompreni, paroli kaj skribi.

4. Eĉ tie, kie ĝi sukcesas, komunikado per unu el la grandaj, internacie disvastigitaj etnaj lingvoj estas baze malegaleca, ĉar ĝi donas avantaĝon al tiuj, kiuj parolas tiun lingvon denaske. La aliaj landoj, interalie tiuj de la Tria Mondo, kiuj plej malfacile povas elteni tian investon, devas elspezi grandajn sumojn edukante siajn civitanojn al kapablo en tiuj lingvoj, kvankam ili neniam plene atingas tiun celon kaj la komunikado restas malegala. Paralela problemo estas tio, ke la internacia komunika teknologio ankaŭ plejparte restas en la manoj de la landoj de la industriigita mondo, tiel ke la Tria Mondo ankaŭ en tiu sfero suferas malavantaĝon. Resume, la lingva problemo malegale afliktas la diversajn landojn depende de ilia potenco en la mondo kaj de ilia lingva situacio.

5. La lingva diverseco tamen alportas al la mondo diversecon de kulturaj valoroj kaj de aliroj al mondaj problemoj, multaj el kiuj meritas pli vastan diskonigon. La morto de lingvo aŭ kulturo nerevokeble malfortigas kaj malriĉigas la mondon.

Surbaze de tiuj konkludoj, la Kongreso tamen konstatas jene:

1. Antaŭ cent jaroj estis publikigita internacia lingvo sub la nomo Esperanto, kiu intertempe transformiĝis el surpapera projekto en vivantan lingvon kaj kulturon de milionoj da homoj.

2. Esperanto estas ne nur taŭga, sed ankaŭ jam uzata, por esprimi ĉiujn aspektojn de la homa vivo en scienco, kulturo, edukado, personaj kontaktoj internaciaj, ktp.

3. Esperanto estas relative facile lernebla, por homoj devenantaj el ĉiuj lingvogrupoj.

4. Esperanto jam estas uzata tre sukcese en edukado, kie ĝi ebligas al lernantoj, post nur kelkmonata lernado, fari kontaktojn en plej diversaj landoj kaj trakti senpere realajn problemojn de la internacia vivo.

5. Esperanto estas efika enkondukilo al la lingvolernado ĝenerale kaj al kreo de internacia konsciiĝo inter la lernantoj.

6. Celante la internacian utiligon, aldone el naciaj kaj lokaj lingvoj, Esperanto helpas konservi tiujn naciajn kaj lokajn lingvojn kaj reduktas la minacon, ke certaj lingvoj superregos kaj eĉ mortigos aliajn.

7. Pro sia facileco kaj neŭtraleco, Esperanto ebligas nivelon de komunikado inter la homoj kutime neatingeblan per aliaj, etnaj lingvoj lernitaj kiel fremdaj lingvoj.

Sekve la kongreso jene rekomendas:

1. Ke la internaciaj organizaĵoj, interalie Unesko, Unuiĝintaj Nacioj kaj la Eŭropa Komunumo, esploru pli vastan enkondukon de Esperanto en la diversaj ŝtatoj, kiel lerneja lingvo kaj ankaŭ kiel rimedo en ĉiuj specoj de internacia interagado.

2. Ke la naciaj registaroj faciligu ĝian utiligon en lernejoj kaj inter siaj civitanoj, subtenante tiajn iniciatojn kaj forigante eventualajn barojn aŭ antaŭjuĝojn.

3. Ke ĉiuj respondecaj civitanoj de la mondo informiĝu pri Esperanto kaj la faciligoj, kiujn ĝi prezentas, en la publika diskutado de mondaj problemoj.

4. Ke la internaciaj organizaĵoj, naciaj registaroj kaj neregistaraj organizaĵoj okazigu renkontiĝojn kaj kunvenojn de la civitanoj de la diversaj landoj por diskuti gravajn mondajn problemojn en Esperanto kaj ĝenerale stimulu tian internacian debaton.

5. Ke ĉiuj koncernatoj rekonu la atingojn de Esperanto en antaŭenigo de la monda paco kaj en stimulado de egaleca komunikado inter la homoj tra pli ol cent jaroj de utiligo.

Internacia Junulara Kongreso en Kerkrade (Nederlando)

De la 17-a ĝis la 23-a de julio 1989 en Kerkrade okazis la 45a Internacia Junulara Kongreso. En tiu ĉi renkontiĝo partoprenis ĉirkaŭ 600 junuloj el 38 landoj. El GDR partoprenis kvin junuloj. La delegacio de GDREJ konsistis el **Torsten Bendias** kaj **Ulf Beling.** La propono de la Junulara Komisiono por **Gerd Lutter** ne estis realigita pro kialoj sendependaj de GDREA. La kongreso konsistis, kiel kutime, el tri ĉefaj partoj:

La kongresa temo kun la necesaj aranĝaĵoj, la kunsidoj de la TEJO-Komitato kaj de diversaj branĉaj organizoj, kaj granda nombro de aranĝaĵoj kun festivala karaktero.

La organizintoj elektis la multflankan kongrestemon „Transporto". Aliflanke oni maluzis la ŝancon, kunligi aktualajn tendencojn kun specifaj problemoj de la Esperanto-movado per la elekto de aktuala temo. Pro tio la intelekto de la partoprenintoj ne estis tro multe bezonata.

Aparte bone la organizintoj kapablis integri la partoprenintojn pere de ludideoj. Laŭkutime ekzistis kongres-ĵurnalo. La libroservo ampleksis 400 titolojn kaj 30 sondiskojn, kasedojn, videobendojn kaj kompaktajn diskojn [CD]. Ĉirkaŭ 20 kursoj, interesrondoj, grupetoj okazigis aranĝaĵojn (BEMI, baldancoj, Bahao, lignoŝua danco (!), konstruo de kajtoj, radiostacio, sporto, lingvaj kursoj ...). Laŭtradicie okazis Internacia Vespero, ekskursa tago (Maastrich), futbalo (ĉi-foje ne la gastiganto kontraŭ la mondo, sed Esperanto kontraŭ Kerkrade). Tre multflanka estis la kultura parto, de hungara kaj kataluna folkloroj ĝis rokgrupoj (Team', Persone, TBC ...). Kulmino estis sendube ankaŭ la teatra grupo „Kia Koincido" el Bonn kun „Kato sur varma ladotegmento" de Tennesee Williams. SAT-Junulfako organizis aranĝaĵon.

Dum la kunsidoj de la TEJO-komitato estis novelektitaj la estraro kaj la „komisiitoj". Okazis grandaj personaj ŝanĝoj en la estraro. Escepte de du fakoj, ĉiuj havas novan funkciulon. Reelektita estis la prezidanto **Jan Koszmaluk**, la nova Ĝenerala Sekretario estas la britino **Louise Frith**. El GDR elektiĝis **Torsten Bendias** kiel membro kaj komisiito pri „Aktivula Trejnado". Unuaj oficialaj agoj de la estraro estis interparoloj kun reprezentanto de Internacia Studenta Ligo kaj priekzameno kaj konfirmo de la kandidato por la TEJO-kongreso 1994, la sekcio de Sudkoreio. Novaj sekcioj fariĝis Kubo. kaj Zairo. Tiel TEJO havas 31 landajn sekciojn.

Dum la lasta jaro la membronombro de TEJO altiĝis je 8 % (al 10 200).

Kun la reprezentanto de Kubo okazis preparaj interparoloj pri IJK, kiu estos julie 1990 en Playa Giroń. Tiu ĉi venonta kongreso havos relative malmultajn partoprenantojn, sed enorman signifon por la junulara movado en Sudameriko. Ĉiuj partoprenantoj subtenis pli oftajn aranĝojn de TEJO-kongresoj ekster Eŭropo.

T. Bendias

„Antaŭjuĝoj inter homoj kaj popoloj — vojoj ilin forigi"

Faka TEJO-seminario en la Eŭropa Junulara Centro, Strasburgo

En novembro 1989 por mi realiĝis unuafoje partopreno en faka Esperanto-seminario pri nemovada temo. TEJO estis organizinta tiun seminarion en kunlaboro kun la Internacia Junulara Centro, ero de la Eŭropo — Konsilio en Strasburgo, la seminario estis bone preparita, kaj la lokaj kondiĉoj estis vere modelaj. Partoprenis ĝin 30 TEJOanoj, ĉefe el membroŝtatoj de Eŭropa Komunumo. Ĉefino de la kongresejo zorgis pri nia bono la tutan semajnon kaj partoprenis la debatojn kaj la plej multajn prelegojn. La seminariejo ofertis kapaŭdilojn, mikrofonojn, projekciilojn, televidon, videon kaj la tradukkabinojn por la tradukistoj.

La tuta programo okazis en Esperanto kaj la angla, pro tio ankaŭ la lerna efiko estis tre intensa.

Inter la (laŭ mia opinio tro multaj) 30 prelegoj estis la plej interesaj:

Nikola Rašiĉ: „Antaŭjuĝoj kiel psikiatria kazo kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto",

Klaus Dahmann: „Fortiĝo de antaŭjuĝoj kaj novfaŝismaj tendencoj en FRG" kaj **Martin Haase** pri „dulingvismo kaj antaŭjuĝoj".

Post tiuj prelegoj ofte sekvis vigla diskutado, sed en la programo por tiu mankis libera spaco. Interesa nuanco estis la formiĝo de laborgrupoj, kiuj enketis en la urbo inter civitanoj pri antaŭjuĝoj rilate al Esperanto. Kelkaj el tiuj provoj ne estis sufiĉe maturaj, sed tio estis vola. Celo estis aktivigi ĉiujn partoprenantojn sendepende de ilia klera grado.

Tiel ankaŭ la organizintoj ne povis oferti pretajn receptojn, ja eĉ malpli pri la problemo „kiel forigi antaŭjuĝojn". La kelkfoja komuna malscio tamen kondukis al interesaj diskutoj.

Unue estiĝis klare, ke ekzistas grava malsamo inter antaŭjuĝoj kaj stereotipoj. Multaj spertoj, taksataj kiel antaŭjuĝoj estas reale stereotipoj, kies bazo estas nescio aŭ neklara imago pri iu fenomeno. Mi mencias tion, ĉar ofte inter esperantistoj oni plendas pri antaŭjuĝoj sen pripensi argumentojn. Antaŭjuĝojn oni povas vidi fakte kiel stereotipoj malgraŭ pli bona scio, kaj pro tio ili estas danĝeraj. Interesa diskuto okazis pri tio, ke ĉiu pensas en t. n. tirkestoj, klasifikas. Kaj montriĝas, ke tiuj tirkestoj estas taŭgaj en multaj situacioj, povas helpi al orientiĝo.

Kiam esperantistoj renkontiĝas, estas la dua kutima demando post tiu pri la nomo: „El kiu lando vi venas?". En tiu maniero kompreneble kuŝas danĝero. Ĝi estas des pli granda ju malpli mi estas vola forlasi mian kadron de pensa, kultura, kutima ktp. tradicio. En tiu konekso aperis la problemo de naciecaj konfliktoj, ĉefe ni traktis la temon „gastlaboristoj" en Okcidenteŭropo. Tie diversaj popoloj vivas kune kaj laboras en la samaj laborejoj, sed malgraŭ pli bona scio antaŭjuĝoj estas tre fortaj kaj iĝas pli gravaj en la interpartia balota konkurenco. Tre grava kialo evidente denove estas ilia relativa izoleco, ĉar gastlaboristoj ja ne vere aliĝas al la landa socio, sed (pro timoj, pro kutimoj, pro socialaj kaŭzoj?) denove retiriĝas en siajn naciajn komunumojn.

Simila ekzemplo estas la Esperantomovado. La relativa izoleco estas tipa eco, kaj pri kelkaj partoprenantoj mi havis la imagon, ke la horizonto pri ĉio ekster la Movado estas tre limigita. Laŭ mi la ofte citataj kaj en libroj aperintaj „antaŭjuĝaj temoj" estas plej taŭgaj por la esperantistoj mem kiel mempravigo, memprotekto. En tiu kunteksto estis menciataj personaj spertoj kaj la interesa pravo, ke nature ankaŭ ekzistas pozitivaj antaŭjuĝoj, ankaŭ pri Esperanto.

En la diskutado multaj menciis la rolon de diversgrade izolataj sociaj grupoj, kiel religiaj, mondkonceptaj, junularaj stilgrupiĝoj kaj iliaj maltoleraj rilatoj, gejoj kaj iliaj spertoj.

Kompreneble ne aperis solvo fine de la seminario. Sed la komuna vidpunkto estis jena, ke la forigo de antaŭjuĝoj estas grava por certigi la pacan pluevoluon. Plej grava vojo tien estas forigi izolon de grupoj inkluzive de lingvaj baroj. Antaŭjuĝoj povas esti intence faratajĉiam por akiri politikan aŭ alian avantaĝon. Ŝancoj ne estos, kiam la forigo de alia opinio- sistemo estas kondiĉo por la atingo de la propra celo. Kiam por la plur ekzisto de la alia ene de mia propra valorsistemo estas spaco, tiam estas loko por la kapablo trejniĝi pri toleremo. Tial la plej multaj kunsubtenis la ideon pri kune respondeca, multkultura socio kun ekvilibro inter unueco kaj aparteco. Sed tio jam estus temo por nova seminario.

Pri tiu lasta TEJO eldonos kun la Centro broŝuron, kiu aperos fine de tiu ĉi jaro..

T. Bendias

Pri la 41a IFEF-Kongreso (13a – 19a de majo 1989) en Salou – Hispanio

Denove jubileis la fervojistoj- esperantistoj: de 80 jaroj vivas la fervojista Esperanto-movado, kaj 41 kongresoj sinsekvas seninterrompe. Tion ĉi menciis i. a. la prezidanto de IFEF en sia parolado okaze de la inaŭguro de la kongreso la 14an de majo.

Al Salou, situanta nur 15 kilometrojn for de la mediteranea marbordo, sude de Tarragona, alvenis 554 kongresanoj el 23 landoj, inter ili 3 kolegoj el GDR. Agrablajn tagojn travivis la kongresanoj kaj en la kongresurbo kaj en la kongresejo hotelo NEGRESCO, kvankam la laborkondiĉoj en la kongresejo ne estis favoraj.

Tamen suksecis la IFEF-Kongreso. Jen kelkaj pensoj pri la rezulto de la kongreso.

— La rezultato de la senlaca laboro de la Terminara Komisiono estis reprezentita. Post preskaŭ tridekjara fortostreĉa agado de la TK estas farita nun la „Fervoja Terminaro en Esperanto", suplemento al „Lexique général des termes ferroviaires (UIC)". Kolego **D. Hartig** trafe skribis en IF (3/89), ke nia komuna verko

  · fariĝos utila laborilo kaj unuecigos tiamaniere la Esperanto-faklingvon de la fervojistoj kaj

  · konvinkos pri la universala taŭgeco de Esperanto kiel pontlingvo inter la nacioj.

— La faka ĉefprelego sub la titolo „Projekto pri fervoja kunligo per internacia ŝpuro inter Francio kaj Barcelono — decido de la hispana ministra konsilio por adopti la internacian spuron" pritaktis la planojn adopti partojn de la fervojliniaj retoj. Laŭ la projekto de RENFE (Hispanaj Naciaj Fervojoj) oni intencas rekonstrui sekvajn liniojn kun internacia ŝpuro:

— ĝis 1992
Madrido — Brazatortas — Cordoba — Seviljo

— ĝis 1994
Madrido — Zaragozo — Barcelono — franca landlimo kaj

— pli poste ankaŭ Madrido — Basquejo — Irun — Brazatortas — Lisbono (Portugalio)
—Barcelono — Valencio — Murcio.

Tiu ĉi projekto realigis malnovan aspiron, nome kunligi la hispanan kaj eŭropan fervojreton seninterrompe.
Dum la 2a Eŭropa Simpozio pri Relvojkonstruado en oktobro 1988 en Barcelono oni deklaris, ke la franca registaro plene apogas plilongigon de la rapidtrafika TGV ĝis Perpignan por kunligi ĝin kun la linio Barcelono — Madrido — Seviljo.

— En la programo ne mankis prelegetoj pri „Aktualaĵoj el diversaj

landoj". Estis prezentitaj kontribuajoj el 10 landoj; i. a. pri „Pasaĝervagono por handikapuloj" (ÖBB — Aŭstrio), „Elektronika lokrezervado" (SNCB — Belgio), „150 jaroj de fervoja trafiko" (ČSD — ČSSR), „Pri nova franca lokomotivo (SYBIC) serio BB 26000" (SNCF — Francio).

— Dum la kongreso okazis ankaŭ estrarelekto. Sekretario Otto Rösemann laŭ propra deziro ne rekandidatis, la nova sekretario fariĝis **d-ro Romano Bolognesi** (Italio).

La gastiganta hispana IFEF-sekcio okazigis ankaŭ kulturan kaj turisman programon. Estas menciindaj la bankedo kaj balo. Trafe priskribis kolego **v. Leeuwen** la eventon: „Dum la manĝado, bone prizorgita kaj preparita, ni denove travivis surprizegon: subite mallumiĝis kaj kompreneble ni opiniis: perturbo! Sed ne: lumjetiloj sur la scenejon kaj imagu, el la planko supreniĝis baleto, kiu baldaŭ kuntiris nin en turbula spektaklo kun mirigaj lumefektoj, dancoj ktp. Tio vere estis grandioza surprizo de la bankeda vespero, ĉar neniel anoncita!"
Marde posttagmeze ni vizitis la urbeton„ Mora la Nova" sekvante la „Vojon de la vino" tra montara kamparo, kaj merkrede vespere ni vidis katalunajn folklorajn dancojn subĉiele sur la teraso de la hotelo Negresco.
Impona restas ankaŭ la fervojaj vojaĝoj al kaj de Hispanio tra Svisio kaj fervojaj ekskursoj laŭlonge de la mediteranea marbordo al Tarragona, Valencio kaj Barcelono.
La norvegaj fervojistoj invitis al la 42a IFEF-kongreso. Ĝi okazos en Hamar de la 2a ĝis 8a de junio 1990.

Horst Jasmann

Reago de veterano

K-do **Ernst Diedrich** el Warin estas veterano de la Komunista Partio kaj iama laborista esperantisto. Kiel aŭtodidakto post 1945 li fariĝis instruisto por la rusa lingvo. Lastjare, li festis sian 80-an naskiĝtagon kaj estis distingita per la „Patrolanda Meritordeno". Gratulon!
Ne estas la unua fojo, ke k- do Diedrich ne konsentas kun la politiko de GDREA. Li skribis al la redaktoro:

„Kara k-do Blanke!
Mi enmetu artikolon, respondante al via raporto pri Moskvo. Samtempe mi sendis tradukon de ĝi al k-do Kurt Hager.
Jam longe mi ricevis raporton pri la renkontiĝo en Moskvo kun la foto de la grupo kaj vi ambaŭ (vi + Heinel) maldekstre de ĝi. Kial vi silentis? Ĉu komunistoj kapablas silenti pri ĉio, kio estas freneza en la nuna SU?[1]) Laŭ via sinteno mi nun ankaŭ komencas kompreni, kial la dissendado de „Isto" estas bremsata[2]).
La renaskitan „Iston" mi jam ricevis antaŭ jardekoj de Rudi Graetz, kaj mi legas ĝin depost tiam. Nature en ĝi — iam kaj iam — estas eraroj. Kiaj estas la aliaj Esperanto-jurnaloj? Kaj kiel vi taksas „der esperantist"?[3])
Ofte estas longaj listoj kun iuj libroj en „der esperantist", kiujn neniu povas aĉeti aŭ prunti.[4])
Samtempe en nia centra Ŝtata Biblioteko estas valora kaj granda Esperanto-biblioteko, kiun la familio Maier (dentisto) sisteme ordigis, antaŭ jardekoj. Ĝi estis savita el la ungegoj de la hitleranoj.[5])
Kial mortsilenti ĉion?
Kial ne doni en nia ĵurnaleto kelkajn atentigojn?"

Respondo:

[1]) Ŝajnas al mi, ke la raporto pri la 22-a Konsultiĝo en Moskvo („der esperantist", n-ro 4/89, p. 78 - 79) estas tute sufiĉa. Al la alineo 4 (pri la debato pri la Komunista Esperanto-Kolektivo, KEK) estas nenio aldonenda. Tiun debaton la prezidanto kaj la sekretario de GDREA aktive partoprenis, do ne silentis. La rezulton de la debato ili akceptas. Kompreneble, necesas substreki, ke

ĉiu landa asocio memstare devas tiri siajn konkludojn. La konsultiĝo nur konsultiĝis, klare. Ĝi ne ellaboris decidojn devigajn por la partoprenintaj landaj asocioj.
Ne estas la tasko de GDREA prijuĝi aŭ komenti la nunan evoluon en Soveta Unio.

[2]) Estas malica imputo al GDREA, ke ĝi bremsis (aŭ -as) la dissendadon de „Internaciisto". Laŭ la peto de la redakcio en Aŭstrio, GDREA dissendis la revuon. Post certa tempo la redakcio memstare decidis ne plu uzi la adreson de GDREA sed sendi la revuon rekte al la interesitoj. Cetere, GDREA mem ricevadas la revuon tre neregule, eble pro tio, ĉar la redakcio de „Internaciisto" malakceptas, ke GDREA ne fondos KEK-sekcion.

[3]) Ĉiuj legantoj estas alvokataj skribi siajn opiniojn, kritikojn kaj sugestojn pri „der esperantist" al la redakcio. Eble ne estas la tasko de la redaktoro mem prijuĝi la revueton.

[4]) Se temas pri la rubriko „Laste aperis ...", ĝi nur celas informi, kio aperis en kaj pri Esperanto. Se la sola kriterio por publikigi tiajn listojn estus la eblo aŭ neeblo aĉeti aŭ prunti la materialojn, tiam oni povus entute rezigni pri bibliografia laboro.
Cetere, esperantisto ĝenerale trovas eblecon (ekz. per siaj korespondaj ligoj), havigi al si iujn titolojn. La unua ŝtupo estas, entute informi pri la apero de la materialoj.

[5]) Estas vero, ke en la Ŝtata Biblioteko de Berlin ekzistas ĉirkaŭ 3 000 titoloj de Esperantaj kaj aliplanlingvaj libroj. Duplikato de la katalogo troviĝas en la oficejo de GDREA. Ĉiu interesito povas konsulti la katalogon surloke.
Post la geedza paro Meier el Berlin pri la katalogo okupiĝis i. a. s-ro Jürgen Hamann el Leipzig, iama bibliotekisto. Li bedaŭrinde ne finis la komencitan prilaboradon. Ĉar ni ankaŭ disponas pri multaj indikoj pri planlingvaj materialoj en aliaj bibliotekoj de GDR, ni planas kompili centran katalogon. Bedaŭrinde ĝis nun neniu prenis sur si la grandan necesan laboron. Ne estus la problemo eldoni tian katalogon. Mankas kompetenta kaj laborpreta homo.
Cetere, somere 1989 s-ro Thorsten Lemke el Berlin finis la kompilon de katalogo de la biblioteko de GDREA. La biblioteko enhavas 2 200 titolojn. La materialoj estas konsulteblaj nur surloke en la oficejo de GDREA (Friedrichstraße 120). Interesitoj ricevas ekzempleron de la katalogo kontraŭ M 5,00.

D. Blanke

Kaj jen la artikolo de Ernst Diedrich:

Pardonu! Mi estas komunista esperantisto.

Sekve mi apartenas al tiuj, kiuj dum la 22-a Konsultiĝo de Esperanto-asocioj de socialismaj landoj en Moskvo estis malbenataj. D. B. en Nr. 156 de „der esperantist" skribas pri la forta debato, okazinta pro nia ekzistado, ĉar ni ja skribas kaj pensas laŭ la estinteco. Mi mem tre miras, ke mi ankoraŭ estas en la nuna glora estanteco (kiu fulme estos estinteco — Schiller). Oni rekomendas la „Novan Penson", ĉar nia komunista pensado havas nenion komunan kun ĝi. „Tia nova penso estas orientata al dialogo kun diversideologaj homoj kun bona volo."
1930 mi fariĝis disĉiplo de Ernst Thälmann, kiun mi neniam vidis, sed atenteme studis lin kaj laŭ liaj konsiloj reale agis. Kion k-do Ernst Thälmann instruis? Jen — paroli kun diversideologiaj homoj, speciale kun socialdemokrataj, kun religiuloj, eĉ kun membroj de la Hitlerpartio!
Thälmann rifuzis la radikalan batalkrion: „Batu la faŝistojn, kie vi ilin renkontas!" Estus bona instruo por la „saĝegaj", modernaj admonantoj, iomete pli zorge studi la malbenitan estintecon de la decidaj jaroj por Eŭropo kaj la tuta mondo, tiam oni ankaŭ trovos la heroan historion de la estinta faŝista leŭtenanto Scheringer, kiun niaj komunistaj k-doj en pundomo konvinkis pri la praveco de la komunismo. Krome, oni riproĉas al ni, ke IPE estus kvazaŭ refondo de la III-a Komunista Internacio, kio estus erara

kaj rekte malutila. (Dum la nuna modernmanio). Sciu, vi ĉionsciantoj, la dissolvo de tiu Internacio estis unu el la grandaj eraroj. Sed krome, neniu el ni intencas nun refondi la estintan Internacion. K-do Krenz diris en Ĉinio, ke Marx admonis „Proletoj de ĉiuj landoj unuigu vin!" sed ne: „Proletoj ke ĉiuj landoj diskverelu vin!" Kaj la ĉinaj k-doj samopinias kun li. (Iam — post nia morto — realiĝos mond-komunismo).
La voko de Ernst Thälmann al ni, paroli kun ĉiaj homoj, ne signifas adopti malĝustajn, frenezajn pensojn, tio estus oportunismo. Nia devizo ĉiam estis, estas kaj estos: „Disbatu la malĝustajn argumentojn, sed ne la homon!"
Kiam la sovetia Saĥarov mensogis pri nia germana KPD, nia Ernst Thälmann ktpl, mi ne silentis, sed skribis proteste al la redakcio de la „Nova Tempo", sed oni forigis mian opinion, ĉar tio estas „pluralismo" en burĝa senco.
Kaj pri la nova „Brain Drain" de la imperialisma Germanio, do, la monstra hirudo, kiu ree elsuĉas milojn da gejunuloj el nia lando, mi ankaŭ ne silentas, ĉar tio estas Rabo kaj Krimo. Imperialismo restis imperialismo, nur dum la estanteco: ankoraŭ pli krima kaj abomeninda ol iam en la estinteco. Kiu postulas de ni, ke ni silentu?

Ernst Diedrich, Warin

Komento

Fakte ĉi tie ne sekvas komento. Unue la redaktoro volis reagi al kelkaj problemoj. Sed releginte la raporton pri la 22-a Konsultiĝo, li rimarkis, ke li devus ripeti jam diritan. La legantoj mem ja atente analizas la nunan tempon. Ili legu la artikolon kaj konkludu! Kaj eble la leganto rimarkos, ke ekzistas tre diversaj vojoj por laborista esperantisto agi en la hodiaŭa mondo. Cetere, GDREA tre atente analizas kaj prilaboras la historion de la laborista Esperanto-movado.

Jes, ni vere lernu el la historio!

D. B.

Postnoto

Ernst Diedrich petis per letero de 29. 12. 89 ne publikigi sian materialon pro la sociaj ŝanĝoj en GDR. Bedaŭrinde lia letero venis tro malfrue. Jen la sorto, kaj la historio decidis jam.

12a ITREE sukcesplena

De la 17a ĝis la 23a de septembro 1989 okazis en Boži Dar (Ĉeĥoslovakio) la 12a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro.
Tiu renkontiĝo havas longan tradicion. Jam en la jaroj 1973—1979 okazis renkontiĝoj inter esperantistoj el ĈSSR kaj GDR. En 1980 ni subskribis la unuan amikecan kontrakton en Boži Dar. De tiam ambaŭ Esperanto-asocioj aranĝas ITREE alterne. Ercmontaro ja estis montaro de kunlaboro kaj konfliktoj de homoj de ambaŭ nacioj. Hodiaŭ ni rigardas Ercmontaron kiel montaron de paco.

Dum ITREE 89 renkontiĝis 56 geamikoj el ĈSSR, GDR, Bulgario kaj Hungario. La programo estis abunda kaj enhavriĉa: perpiedaj aŭ aŭtobusaj ekskursoj sur la monton Klinovec, al Jachimov, Mariánské Lázné, Karlovy Vary, en naturprotektitan torfejon, vesperaj lumbildprelegoj kaj kantoj.

Nome de la Subdistrikta Estraro Schwarzenberg de GDREA mi kore dankas al la ĉeĥaj organizintoj.

Rudolf Eichler

Lingva ekzameno

La Metodika Komisiono de GDREA okazigos la sekvan lingvan ekzamenon (Sprachkundigenprüfung I) la 30an de junio 1990, en Berlin. Petu informojn kaj aliĝilon ĉe: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080.

100-jara esperantistino

S-ino Margarete de Waldowski, kiu kune kun sia edzo loĝis en Berlin (GDR) ĝis 1970 — fariĝis 100-jara la 1-an de decembro 1989. La jubileulino nun loĝas en Okcidenta Berlino. GDREA tre kore gratulas.

PoSET '89 – Unua jubileeto

Nun jam la kvinan fojon okazis „Potsdama Somera Esperanto-Tendaro", de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1989.

Ĝi kompreniĝas kiel kontribuo de la distrikto Potsdam al la internacia turisma agado en Esperantujo. Tiel kunvenis 63 geamikoj el ses landoj (Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio). Ili konatiĝis kun la impresplena historio kaj interesa nuntempo de la regionoj Brandenburg, Potsdam kaj Berlin.

Apartan dankon al **Linhart Ryznar** el Pardubice (CS), kiu ĉeestis jam la kvinan jaron, bonhumore subtenis nin en organizaj demandoj, gvidis fakultativan Cseh-kurson kaj ĝojigis nin per sia magi-arto. **Austra Pumpure** el Latvio entuziasmigis ĉiun per kantado kaj gitarludo.

Ni esperas ke nia aranĝo kontribuas al la plua firmigo de amikeco inter esperantistoj de diversaj landoj.
PoSET '90 atendas vin!

Rainer Pauli

SEFT logas

Ankaŭ la tradicia Somera Esperantista Familia Tendaro en lagoplena regiono ĉe Thomsdorf sukcesis. En aŭgusto 1989 dum unu semajno ripozis 61 geamikoj el naŭ landoj (nova rekordo!): Hungario, Bulgario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, GDR, Sovetunio, Nederlando, FRG kaj Usono. Venu mem kaj konvinkiĝu en 1990!

Distrikta ekskurso

La 10an de septembro okazis en Oelsnitz (Ercmontaro) ekskurso de esperantistoj de la distrikto Karl-Marx-Stadt. 25 partoprenantoj faksperte estis gvidataj de la lernanto Jürgen Sonntag, dum vojo „Sur la spuroj de la ŝtonkarba minado".

Laŭ informo de Chr. Papenmeier

Verda helpo

En la montaro Jeseníky en norda Moravio (Ĉeĥoslovakio) en aŭgusto 1989, okazis la unua arbara labortendaro „Verda Helpo", organizita de la Sekcio de naturprotektantoj de ĈEA kaj de E-klubo de la distrikta urbo Šumperk.

Partoprenis ne nur esperantistoj, ĉar celoj de la tendaro estis konkreta helpo al arbaroj kaj propagando de Esperanto. Krom komuna laboro oni efektivigis turisman programon, bazan kurseton de Esperanto, fine estis plantita Esperanto-arbo kiel simbolo de reciproka amikeco kaj de efika renovigo de la arbaroj.

Por la venontjara „Verda Helpo" petu informojn de: „Verda Helpo", Stanoslav Droppa, sídl. 546, CS-788 14 Šumperk 6, Ĉeĥoslovakio.

SEL'89 en Poprad

Ekde 1987 ekzistas nia junulara Esperanto-grupo en Torgelow. Ni estas gelernantoj de la lernejo „Kopernikus", speciala lernejo por lingvoj. Ĉi-jare ni entute estas 20, sep progresantoj kaj 13 komencantoj.

Julie 1989, ses membroj de nia grupo partoprenis la duan etapon de la Somera Esperanto-Lernejo en Poprad, kune kun la partoprenantoj el Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Hungario, Sovetunio, Britio, Nederlando kaj GDR. Ni vizitis B-kurson kiun gvidis s-ro Anton Zachariaš. Krom bonega instruado ni ankaŭ havis belajn travivaĵojn: Internacia vespero, diskotekoj, prelegoj pri la naturo de la Altaj Tatroj, vizitadoj de biblioteko kaj de la preĝejo kaj ekskursoj en la Altajn Tatrojn. Ni dankas la organizintojn, kiuj zorgis per interesa programo por nia bonstato.

Eluzante tiun ĉi eblecon, ni elkore salutas ĉiujn GDR-anojn, kiuj kun ni estis en Poprad, speciale la Stralsund-anojn.

El letero de la Esperanto-grupo Torgelow

Kelkaj arangoj en GDR en 1990

27.4.—2.5. **Internacia seminario** en Bad Saarow: Esperanto en altlernejoj kaj universitatoj. K: GDREA, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080[2])

7.—11.5. **ITREE** (Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro). K: Hannelore Bünger, Fritz-Heckert-Str. 32, Schwarzenberg, 9430[2])

25.—27.5. **5-a Centra Renkontiĝo** de GDREA. K: GDREA (v. supre)[2])
[por junuloj: 23. — 28. 5.]

7.—24.8. **DERSFIB** (bicikla vojaĝo tra GDR, de Königstein al SEFT). K: Maik Jung, Große Mühlstr. 12, Dippoldiswalde, 8230[2])

18.—25.8. **SEFT** (Somera Esperantista Familia Tendara) ĉe Thomsdorf. K: W. Pfennig[2])

14.—21.10. **Intensa Kurso** por gvidantoj de lernejaj E-kursoj, en Göhren. K: Heinz Weißflog, Am Stadtrand 8, Fach 5-08, Sassnitz, 2355[1])

22.—27.10. **Intensa lingvokurso** en Bollmannsruh. K: D. Trenner, Hertzstr. 83a, Falkensee, 1540[1])

2.—4.11. **Semajnfina seminario** en Neubrandenburg. K: W. Pfennig (v. supre)[1])

K — Kontaktadreso
[1]) nur por GDR-anoj
[2]) internacia (aŭ parte internacia) aranĝo

La 3a Internacia Esperantista Junulara Renkontiĝo vokas

Post la tre sukcesa 2a InterSEJT ĉe Minsk (vidu „der esperantist" 4/1989) FEJA[1]) kunlaborе kun loka packomitato invitas al la tria Internacia Esperantista Junlara Renkontiĝo (la aranĝo ricevis novan nomon, ĉar la malnova „tendaro" konfuzis eksterlandanojn). Ĝi okazos de la 22a ĝis la 30a de junio 1990 en la urbo Arĥangelsk en Norda Rusio (Sovetunio). Vi loĝos en studenthejmo kaj kunvenos en la Kulturpalaco de maristoj. Al la ĉeftemo „Esperanto kaj la Mondo" vi povos kontribui prelege aŭ kulture. Skribu kiel eble plej frue al: FEJA, USSR, 103885 Moskva, prospekt Kalinina, 14. Kotizoj: 169 rubloj (pago ĝis la 1a de marto 1990), 179 rubloj (ĝis la 1a de junio) aŭ 189 rubloj (poste). Tiuj ĉi prezindikoj validas nur por socialismaj landoj. Konto: 70102589 de FEJA ĉe Eksterekonomia Banko de Sovetunio en Moskvo.
Speciala aliĝilo ne estas aperigota. Kunportu la kvitancon al Arĥangelsk.

[1]) FEJA — Fondajo de Esperantistaj Junularaj Aranĝoj

Turisme al Ĉinio

Somere 1989, Pekina Turisma Servo Tian'an fondis Esperanto-Turisman Sekcion for faciligo de internacia turismo per aplikado de Esperanto. Dek ĉiĉeronoj atendas viajn dezirojn de itinero kaj specialajn postulojn, kontraŭ tre justa prezo. La Sekcio zorgas pri manĝoj, loĝado, vojaĝo ene de Ĉinio. Eblas senkotize partopreni Esperantajn kulturajn programojn.
Petu informojn ĉe: Esperanto-Turisma Sekcio, Pekina Turisma Servo Tian'an, 8, Dong Zhi Men Nan Da Jie, Pekino, 100027, Ĉinio.

Internacia Junulara Semajno (IJS-90)

okazos inter 03-09 de aŭgusto 1990 en la urbo Szödliget.
Partoprenos ĉ. 200 gejunuloj el ĉ. 20 landoj. Aliĝilojn petu de: LINGVO-STUDIO, Szilvási László, H-1675 Budapest, Pk. 87, Hungario.

Bulgario invitas

al Internacia Somera Esperanto-Universitato, kiu okazos de la 14a ĝis la 20a de julio 1990 en Veliko Tarnovo. Petu informojn ĉe: 5000 V. Tarnovo, Bulgario, Esperanto-societo „Lumo", P.K. 121.

Ankaŭ julie

okazos renkontiĝo de esperantistoj-montŝatantoj (tri tagoj en Moskvo, 10 tagoj en Kaŭkazio proksime de la monto Elbrus). Estas planitaj diverskategoriaj montaraj piediroj, surpintiĝoj. Plenan informon vi ricevos en la Esperanto-klubo „Edelvejso", ul. 2-Siniĉkina, 19, SU-111020, Moskvo, Sovetunio, se vi skribos ĝis la 1a de aprilo 1990. Dezirindas havi iom da spertoj en montaraj piediroj kaj bonajn Esperantajn lingvokonojn.

Esperanto en literaturo

En la eldonejo Aufbau-Verlag aperis en 1988 la dua eldono de la germana traduko de „La domo de la fantomoj" de Isabel Allende. La nevino de la iama prezidento de Ĉilio mencias en sia libro ankaŭ Esperanton. Unu el la ĉefpersonoj de la romano, Clara, sentas fortan inklinon al Esperanto kaj eĉ komunikiĝas kun „la vagantaj animoj kaj la eksterteranoj" en tiu lingvo. Tiun interesan fakton malkovris sinjorino Barbara Krone el Berlin.

Laŭ „Berlina informilo"

Letero el Usono:

La tertremo, kiu frapis Nordan Kalifornion, USONO

Estimata samideano!

Por trankviligi niajn samideanojn tra la mondo kiuj aŭdis pri la grava tertremo kiu frapis nian regionon kaj kiuj havas E-amikojn ĉi tie, ni volas informi vin, ke nia oficejo kontaktis multajn esperantistojn en la afektitaj lokoj.
Laŭ nia scio, neniu mortis, nek suferis grandan perdon. En nia oficejo, kiu estas rekte trans la golfeto de San Francisco, kelkaj libraj bretaroj falis sur la plankon, sed detruo estis minimuma.
Se io ajn okazos en nia regiono, afektante esperantistojn aŭ la C.O.-n, ni informos vin.

Sincere via,
Mark C. Stephens
Direktoro, C.O. de Esperanto-Ligo de Norda Ameriko

Letero al la redakcio

Estimataj kamaradoj!

Al vi turnas sin veterano de KPSU[1]), Jakob Hirŝeviĉ Rezinovskij, kun peto: bonvolu helpi al mi en mia esplora laboro. Jam delonge mi okupiĝas pri la historio de la Bolŝeva Labora Komunumo de OGPU[2]).
Antaŭ nelonge en la havaĵo de Ŝtata Lenin-Biblioteko mi trovis 16-paĝan broŝuron en Esperanto: **„La Bolŝeva Labora Komunumo de OGPU".** La broŝuro estis eldonita en la jaro 1931 en Leipzig. Ĝin aperigis la eldonejo EKRELO.
Tiu ĉi broŝuro rakontas kurte pri la Bolŝeva Labora Komunumo, kiu estis fondita laŭ iniciato de **Feliks Dzeržynski,** unu el la eminentaj gvidantoj de KPSU. La Bolŝeva Labora Komunumo estis fondita sur la teritorio de la Bolŝeva regiono (proksima al Moskvo) en estinta bieno de „ĉokolada reĝo", la fabrikanto Kraft.
Celoj de la komunumo estis: reeduki senhejmajn junulojn-krimulojn per socie necesa krea laboro. Por atingi tiun ĉi celon, junuloj — estintaj senhejmaj krimuloj — konstruis ŝuan, trikotaĵan, lignoprilaboradan entreprenon por sportproduktaĵoj. Fondita en 1924, la Bolŝeva Labora Komunumo ekzistis ĝis la jaro 1938. La broŝuro rakontas kaj substrekas, ke la organizintoj de la komunumo trovis en sia

laboro multe da malfacilaĵoj. Unue, oni havis neniun similan ekzemplon kaj sperton en la laboro por „reforĝo" de senhejmaj junuloj. Due, multe da homoj simple ne kredis ke farante tiun eksperimenton oni povas atingi pozitivan rezulton. Sed malgraŭ ĉio oni atingis tiun altan celon.

La membroj de la Bolŝeva Labora Komunumo estis liberaj homoj en plena senco de la vorto. La tuta supera potenco en la Komunumo apartenis al la Ĝenerala Kunveno de la komunumanoj. Dum la Ĝeneralaj Kunvenoj oni pridiskutis ĉiujn kurantajn produktadajn, vivreĝimajn kaj aliajn demandojn. La Ĝenerala Kunveno estis ankaŭ ĉefa juĝisto, krom tio dum la Ĝenerala Kunveno oni elektis komisionojn: por nutraĵoj, vestaĵoj, biblioteko, klubo k.a. Tiu libereco, memstareco, kolektivismo elvokis en la membroj de la komunumo vervon kaj entuziasmon por la krea laboro. La Bolŝeva Labora Komunumo havis propran klubon, kie laboris kelkaj rondetoj kaj artaj grupoj — drama, ĥoro, orkestro k.a. Komunumanoj organizis kaj gvidis ankaŭ la amasan kulturan laboron en najbaraj vilaĝoj. Multnombraj eksterlandaj laboristaj delegacioj, kiuj vizitis en la 20 — 30aj jaroj Sovetunion, vizitis ankaŭ la Bolŝevan Laboran Komunumon. Delegitoj tre alte pritaksis la atingojn de tiu rimarkinda kolektivo. La granda rusa verkisto **Maksim Gorkij,** kiu vizitis la komunumon la 6an de junio 1928, postlasis en la Gasta Libro jenajn lniojn:

— Kiel estinta „socie danĝera" homo, mi sincere certigas: ĉi tie estis kreita absolute mirinda grava afero.

La broŝuro, eldonita en Esperanto en Leipzig, aperis en 1931, kiam la Bolŝeva Labora Komunumo havis sepjaran aĝon. Bedaŭrinde sur la titolpaĝo ne estis indikita la nomo de la aŭtoro, sed nur la nomo de la tradukinto el la rusa lingvo, **V. Polakov**. Maljunaj moskvaj esperantistoj, kun kiuj mi konsultiĝis **(G. Korotkevič, F. Kulagin** k.a.) klarigis al mi, ke tiu V. Polakov estis unu el la membroj de SEU kaj laboris en CK de SEU. Sed kiu estis la aŭtoro de la broŝuro? Tion mi longe ne povis ekscii, sed finfine eksciis. Antaŭ nelonge en miaj manoj troviĝis la revuo „Naŝi dostiĵenija" („Niaj atingoj") n-ro 7 de la jaro 1930. Tiu ĉi revuo estis eldonita en la Bolŝeva Labora Komunumo. En tiu numero de la revuo mi trovis skizon de A. Avtonomov pri „La Bolŝeva Komunumo de OGPU". Mi rimarkis, ke la teksto en la revuo kaj la teksto de la broŝuro eldonita de EKRELO estas identaj. Kiel mi poste eksciis, A. Avtonomov estis ĵurnalisto, estinta edukanto de la Bolŝeva Labora Komunumo. Komunikante al niaj amikoj en GDR pri mia feliĉa trovaĵo — la broŝuro en Esperanto pri la Bolŝeva Labora Komunumo — mi samtempe petus la redakcion de la revuo „der esperantist" kaj la legantojn de tiu eldonaĵo respondi jenajn miajn demandojn:

1-e: Ĉu iu el la maljunaj esperantistoj povas rememori aŭ ekscii ion pri la cirkonstancoj kaj la historio de la eldono de tiu ĉi broŝuro?

2-e: Ĉu inter la maljunaj esperantistoj, vivantaj en GDR, oni povus trovi homojn, kiuj en la 20—30aj jaroj vizitis la Bolŝevan Laboran Komunumon? Se jes, ĉu ili ne povus rakonti pri tiu vizito?

Mi estus dankema al la redakcio de „der esperantist", se ĝi publikigus tiun mian leteron aŭ respondus demandojn kaj helpus al mi en mia laboro pri la historio de la komunumo. Kun varmega saluto,

Moskvo, septembro 1989

Jakob Rezinovskij
El la rusa tradukis
Georgi Korotkevič

1 KPSU — Komunisma Partio de Sovetunio

2 OGPU — Unuiĝinta ŝtata politika gvidantaro — nuntempe Ministerio por internaj aferoj

Persekutitoj de stalinismo?

Esperantistoj el GDR, kiuj pri ilia esperantisteco antaŭ 1965 devis suferi iujn persekutojn aŭ premojn bv. informi GDREA.

Recenzo – Bibliografio, Esperanto-Centro Paderborn 1989. 40 p.

Estis bonega ideo de **Hermann Behrmann**, kompili bibliografion de recenzoj pri ankoraŭ aĉeteblaj libroj! La intenco estas motivigi eventualajn aĉetemulojn. Leginte recenzojn de iom konataj aŭtoroj pri difinitaj libroj, eble el aĉetunto farigos aĉetonto. Ĉiukaze la recenzoj de Esperanto-libroj, kiom malsama estas ilia nivelo (de la libroj kaj de la recenzoj), ili tamen estas parto de la Esperanta kulturo neignorebla. Mi ĉiam notas iom gravajn recenzojn en la koncernataj libroj mem. Fojfoje estas tute interese kompari la (ofte kontraŭdirajn) opiniojn de la recenzintoj. Aparte valoraj farigas tiaj recenzoj, se temas pri malnovaj titoloj. Ĉiam la recenzoj ja spegulas certagrade la nivelon de la esperantmovada situacio.
Se mi guste kalkulis en la broŝuro enestas 558 titoloj kun recenzoj ĉerpitaj el la jarkolektoj 1982 — 1987 de la revuoj „Esperanto" (UEA), „Heroldo de Esperanto", „Esperanto aktuell" (GEA el FRG), „Hungara Vivo" kaj „der esperantist".

D. B.

Rüdiger Eichholz: Esperanta Bildvortaro

Bailieboro (Ontario, Kanado): esperanto press. 1988, 880 p.

La lastjare aperinta verko estas licenseldono de „Das Bildwörterbuch der deutschen Sprache (Der Große Duden, Band 3), 2-a eldono, Mannheim, Bibliographisches Institut 1958. De tiu germana praeldono aperis precize same aranĝitaj eldonoj por la lingvoj angla, franca, hispana, itala, sveda kaj portugala. Do — la Esperanta versio respondas al la germana, kiu aperis antaŭ pli ol 30 jaroj. Jen, dum tiu jaro la aŭtoro de tiu recenzo ekesperantistiĝis. Okaze de sia tridekjara jubileo li povas rigardi la verkon de s-ro Eichholz. Rüdiger Eichholz mem laboris 24 jarojn super la verko: Tio eble plej frape montras la malfortecon de la leksikologiaj potencoj de la Esperantomovado kaj de pli malpli izolite laboranta homo, kiu ja havis kunlaboron de 143 kunlaborintoj el 25 ŝtatoj, kiu „escepte je terminoj pri medicino kaj zoologio mem transprenis la respondecon pri fina termino-elekto" (p. 3).
Li ankaŭ mem kompostis la tutan per komputilo (li dirus: komputoro).
Sed, unue pri la enhavo de la libro mem: Post detala antaŭparolo (3 — 6), per kiu Rüdiger Eichholz rakontas la estiĝon de la libro kaj iom pri la de li aplikitaj principoj sekvas detala enhavtabelo kun jenaj ĉefaj partoj: atomo, universo, tero, homo kaj hejmo; ĝardeno, agrikulturo kaj arbar-kulturo; ĉasado kaj fiŝado; metioj; industrio; presado kaj parencaj medioj; trafiko kaj komunikado; oficejo, banko, ŝtato kaj urbo; vojaĝo kaj libertempo; sporto: distriĝo kaj muziko; scienco, religio, arto; animaloj kaj plantoj (6 — 9). Sur la paĝoj 10 — 672 ni trovas entute 368 ilustritajn temo-kompleksojn detaligantaj la ĉefajn partojn.

Ekz. la parto „Vojaĝo kaj libertempo" havas la temokompleksojn 259 — 267: hotelo, restoracio I + II, kurac-loko, ruleto, bilardo, tabuloj kaj societaj ludoj, kampado, plaĝo. La bildkompleksoj ofte estas kelkpaĝaj. En la bildkomplekso „restoracio" ni ekz. trovas sur la paĝoj 468 — 471 entute 105 bildigitajn objektojn kun la koncerna Esperanta vorto. Krom la relative klare desegnitaj bildoj la libro enhavas 6 tutpaĝajn kolorajn bildojn (homa anatomio, koloroj, 2 x birdoj, papilioj, profundmaraj animaloj), kies preskvalito ne estas bona. La ĉefan vortaran parton sekvas listo de uzitaj signoj (676 — 870) kaj ampleksega indekso (676 — 870). Ĉe la fino oni trovas la liston de la kunlaborintoj (871 — 872) kaj artikolon pri la „perkomputora terminokolekto", Pekoteko, por kiu R. Eichholz varbas (873 — 880). En sia antaŭparolo Eichholz atentigas pri kelkaj leksikografiaj solvoj, kiujn li aplikis:

Novaj radikoj, de li uzitaj unuan fojon, li markis (du steletoj), same radikojn ja troveblajn en PIV sed uzitajn de li kun iom alia signifo (unu steleto). Tiu klara signado estas tre bonvena. Entute nur 407 radikoj havas du kaj 223 unu steleton. Tio ne estas multa, konsiderante, ke la Bildvortaro priskribas 25 000 objektojn. Li krome enkondukis 3 novajn sufiksojn: **-un** por masklaj bestoj, ekz. virbovo (bovuno), virkoko (kokuno); **-uk** por kastritaj masklaj bestoj, ekz. por kapono (= kastrita virkoko) ni ankaŭ trovas kok/un/uko. Eventuale tiuj radikoj montriĝos taŭgaj. La praktiko decidos. Tamen, la tria sufikso -jo por ŝtatnomoj nur aldonas pluan konfuzigan elementon al la jam 100-jara konfuza diskuto. La aŭtoro de la Bildvortaro distingas la uzon de -ujo, -io kaj -jo jene: Se la popolo estas substrekita, kiu donis al la regiono la nomon, Eichholz uzas „German**ujo**", se temas pri geografia regiono, li uzas „Germa**nio**", kaj ŝtato — laŭ li — estu „Germanjo".

Kaj sur p. 871 ni trovas, ke kunlaboris ankaŭ **d-ro Erich D. Krause** el Germanjo (GDR). Pri tio d-ro Krause certe ne ĝojas, ne parolante pri tio, ke GDR ne estas parto de la ŝtato „Germanjo", ĉar almenaŭ ekde 1949 ekzistas nek Germanujo, nek Germanio, nek Germanjo, sed nur du germanaj ŝtatoj. Sed tion oni eble en Kanado ankoraŭ ne eksciis. [Kaj ĵus ĉio ŝanĝiĝas.]

Ĉiukaze, tiom detala kaj ampleksa vortaro kiel la Bildvortaro havas normigan influon, eĉ se la aŭtoro tion tute ne pretendas. Ankaŭ PIV havas „oficialan" normigan influon, malgraŭ, ke ĝi ne estas oficiala Vortaro de la Akademio. La verko en si mem, ĉar la sola ampleksa kaj daŭre citata referencfonto ja fariĝas aŭtoritataĵo, ĉu oni volas aŭ ne. Pro tio R. Eichholz ne bone lokigis siajn subjektivajn preferojn. Ili aperu en la de li eldonata interesa stud- kaj diskutkolekto „Akademiaj Studoj", sed ne en lia vortaro. Kiel mi jam komence menciis, la aŭtoro havis grandan reton de kunlaborintoj. Ne fariĝis klare, en kioma grado li akceptis la proponojn de la diversfake kompetentaj specialistoj. Eichholz ne povas ĉion scii. Malgranda specimena analizo, kiun faris kompetenta terminologo pri la fervoja fako, **Horst Theurich** el GDR, ilustros tiun problemon. Komparante la Bildvortaron kun la germana originalo, oni trovas plenan identecon inter la bildkompleksoj, almenaŭ unuarigarde. En la jaro 1977 aperis tamen la plene tralaborita nova eldono de la germana modelo. Anstataŭ 368 bildkompleksoj kun 25 000 vortoj (kiel la eldono 1958) ĝi havas 384 kun 27 500 vortoj kaj registras la evoluon de ĉ. 20 jaroj (oni nur komparu la bildojn pri aŭtotipoj aŭ aviadiloj). Do, bedaŭrinde la antaŭ nelonge aperinta Esperanta Bildvortaro registras la staton de la tekniko fine de la 50-aj jaroj. Aliflanke, nia plej bona estas tio, kion ni havas. Kaj oni devas — malgraŭ certa kritika atentemo tre alte aprezi la kolosan laboron faritan de Rüdiger Eichholz. Li sole (eventuale tro sole) laboregis persiste dum kvaronjarcento kaj faris el projekto fakton, pionira verko! Pro simplaj vivtenaj kialoj la laboro ofte estis interrompita. Li multe eksperimentis, i. a. per la tre laŭdinda „slipara vortaro". Li multe korespondis kun fakuloj kvankam ne klaras, kiom li akceptis iliajn rekomendojn. Li fine prezentis verkon, kiu iel markas novan etapon en la leksikografio de Esperanto. Ĝi laŭdas sian kreinton kaj samtempe montras, ke estonte similaj verkoj devas esti en pli alta grado ellaborataj kolektive.

D. Blanke

Preiserhöhung für „de"

Liebe Leser! Wir sind leider gezwungen, den Verkaufspreis für „der esperantist" einschneidend zu erhöhen. Mit 0,30 M waren die Kosten dieser Zeitschrift nie zu decken, so daß unser Verbandsorgan immer einen enormen Zuschuß benötigte. Die veränderten finanzpolitischen Bedingungen in unserem Land zwingen uns nun dazu, pro Nummer den Betrag von 2,00 M zu erheben. Diese Regelung tritt mit Nr. 4 in Kraft. Wir werden uns bemühen, ab 1/1991 die Zeitschrift grafisch besser und inhaltlich noch interessanter zu gestalten. Wir hoffen auf Ihr Verständnis und Ihre Solidarität.

Die Redaktion

Rüdiger Eichholz: Bildvortaro: fervojtema parto (kompleksoj 198 – 208)

La bildvortaro estas vere ilustrita vortaro (kompare kun PIV), ĉar ĝi montras al ĉiu termino bildekzemplon. Pro tio ĝi nur povas prezenti konkretaĵojn. Tio estas realigita komplekse, kaj ĝi estas pro tio (preskaŭ senduba. Bedaŭrinde modernaj fervojaj ekipaĵoj mankas. Suplemento aktuala surbaze de la farita kaj farota laboro de la Terminara Komisiono (TK) de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) ŝajnas esti necesa. Tiu TK tradukis la terminojn de LG III kaj IV (LEXIQUE GÉNÉRAL DES TERMES FERROVIAIRES), 6-lingva terminaro de UIC (Union Internationale des Chemins de Fer), Internacia Fervoj-Unio, 3-a kaj 4-a eldonoj. Kompare kun tiuj terminstokoj oni povas konstati, ke en la bildvortaro kaj LG la terminoj estas elektitaj laŭ aliaj vidpunktoj, do ne ĉio estas komparebla.

Por krei fakterminojn, oni devas unue trovi taŭgan radikon por la bazvorto kaj poste decidi pri la formo, en kiu oni prezentu la kreaĵon en la vortaro. La opinioj do povas diferenci, pro kio rekta komparo de la tradukaĵoj laŭvorte ne eblas. Do ni vivu sub la kondiĉoj de la vortfaradaj eblecoj kaj mi koncentriĝu pri elstaraj diferencoj.

Certa kunlaboro inter R. Eichholz kaj TK estas evidenta, sed restis kelkaj (opinio-)diferencoj, krom devioj, kiuj kaŭziĝas el pluevoluo dum la traktado far la TK. Se oni komparas la E-tradukojn de ĉiuj terminoj en unu komplekso (198 Fervoja linio) montriĝas jena klasifiko: De entute 92 terminoj 39 ne estas en LG III*), 36 egalas al LG, 14 devias, 3 egalas laŭ la bazvorto.

Simila situacio ankaŭ ekzistas en la aliaj kompleksoj. Do oni povas uzi la LG-tradukon kaj la bildvortaron komune kaj per tio oni ricevas sufiĉe grandan stokon da fakterminoj fervojaj kaj fervojproksimaj. Sed oni atentu la diferencojn!

Jen iom pri la diferencoj:

1. Komplekso 198, numero 58 (198/58): Laŭ Eichholz (Ei) **teleregata relkomutilo; laŭ TK trakforko telemanipulata.**

   Ei ĝenerale pravas, sed relkomutilo estas teknika detalo, kiu ne gravas el vidpunkto de ekspluatado de la trakaro; gravas la manipulado de la trakforko entute, do la traveturebIo post la manipulado.

2. -adoro (ekzemple en **balast-ŝtopadoro** 198/26 kaj **kompaktiga vibrigadoro** 198/17) ne havas difinon ĉu por ĉiu ajna maŝino, ĉu por aŭtomata maŝino aŭ laborkomplekso?). La konsilo de Ei, uzi ĝin nur kun aldonita difino aŭ klarigo, fakte neniigas terminojn kun tiu ĉi sufikso-kreaĵo. TK tradukis 198/26 jene: ŝtopmaŝino por balasto; 198/17: kompaktiga vibratoro (ankaŭ ne logika sed laŭ PIV 79 ebla).

3. Zono de rel-komutiloj (199/15) ne estas unusignifa; ĝi ampleksas arejon da relkomutiloj, sendepende de la aranĝo. Sed ĝi celas esti vico da trakforkoj unu tuj post la alia.

   La TK-traduko pli taŭgas: **trakokrucaĵa kveritinero,** kvankam ĝi ne mencias la trakforkojn.

4. Krei mallongajn terminojn per dehako el la kompletoj laŭ mia opinio ne estas eleganta solvo kaj ne kongruas kun aliaj fakoj, speciale se temas pri ĝeneralteknikaj terminoj (ekz. **mekana** anstataŭ **mekanika; hidraŭla** anstataŭ **hidraŭlika; hidraŭ-mekana, interkomo, akua** ktp.). Kaj ni ne tute fuŝu Esperanton per enkonduko de ekzemple **kaŭ** (208/35-47) anstataŭ **kaj/aŭ,** kaj nepre ĝi ne estas faktermino, pri kiuj ja temas la bildvortaro!

5. **Interklinki** en TK post profunda traktado estas anstataŭita per **rigli,** do ekz. 199/58 devas esti **riglolevumilo.** Oni ŝparu al mi remaĉi la kaŭzojn!

6. Ĉu **ekspres-pako** (200/2) aŭ **ekspresvaro** (laŭ TK) estas pli taŭga,

ĉiu mem povas juĝi, depende de la celo, esprimi tion.

7. Estas diferenco inter **bagaĝo** kaj (ĝenerala) **pakaĵo**. Bagaĝo estas pakaĵo, forsendata laŭ speciala kontrakto kaj tarifo. Do kunprenata pakaĵo ne estas bagaĝo. Korektendaj ekz. estas: 200/21,27,45; 201/4-11 (12 estas ĝusta!).
8. **Trak-buso** estas germanismo (201/27) kaj eĉ ne trafas la germanan terminon **Triebwagen.** La traduko devas esti **motortrajno** aŭ **motorvagon (ar) o.**
9. **Pecaĵo** en la montrita senco (202/4,6) estas tro ĝenerala; TK tradukis **pecvaro.**
10. 202/27 (limkarga profilo) entenas la ĝustajn radikojn, sed la kunmetaĵo ne estas bona, ĉar la profilo estas limigita, kiun oni povas eluzi por transporti kargon, do **karga limprofilo.**
11. **Danĝer-bremso** estas germanismo (203/43), TK elektis **urĝbremso** (pli trafa kompare kun PIV 1158).
12. (203/43) = (204/36), do sama traduko necesas!
13. 204/45 **pivotigebla seĝo** (ĉu ne tro komplika?), kial ne **turnebla seĝo?**
14. 204/54 **kadro** estas pli bone ol **listelo** (kaj ne devio de PIV).
15. En 206/2 la traduko nek trafas la bildon nek la germanajn esprimojn. Bildigita estas **Fahrdraht** (kontaktdrato), aldonita en la listo estas **Oberleitung, Fahrleitung** (kontastlineo), kiu povas esti **Kettenfahrleitung** (katenario).
16. En 206/3 **pantografo** estas ĝusta, sed la germana termino por tio estas **Scherenstromabnehmer;** ĝenerale **Stromabnehmer** estas **kurentodeprenilo.**
17. En 208/14,17,19,23,24 ... **malŝarĝebla** ne trafas la destinon (gravas ne la ŝarĝo sed la kargo). TK tradukis ĝuste: **malkargadebla.**

Ekzistas nun verko, kiu prezentas en Esperanto fervojtemajn fakterminojn, kiuj apudas la tradukaĵon far la Terminara Komisiono de IFEF (ofte egalas, kelkfoje diferencas). Por ebligi tutmondan **unuecan** tradukon de fervojaj fakterminoj, mi rekomendas uzi la tradukojn el LG IV, ĉar multnacia kunlaboro en TK pli kompetentas ol unupersona kreaĵo. La bildvortaron ni uzu kiel aldonaĵon sub atento de la radikoj laŭ TK. Eble estonte plimaturiĝos kunlaboro de R. Eichholz en la Terminara Komisiono de IFEF, ekzemple en la novaj TK-taskoj, verki aktualan kaj difinan vortarojn.

H. Theurich

*) Kompleta komparo kun LG IV laŭ plej nova stato ankoraŭ ne eblas, ĉar tie ĝis nun mankas germanlingva indekso, kio malfaciligas la faron.

Jubileo. Jarcento de Esperanto. Div. aŭtoroj, komp. kaj redaktis Mark Fettes. Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio, 1988. 164 p. ilustrita

La jubilea jaro estis preparadita dum periodo sufiĉe longa kompare al la ekzistado de Esperanto. Survoje al la granda evento aperadis jubileaj programoj kaj gvidiloj internaciaj kaj naciaj, furoris la dua rezolucio de Unesko favore al Esperanto, eldonatis libroj (inter ili originalaj romanoj en antaŭe neniam vidita kvanto), okazadis konferencoj sciencaj, fakaj, primovadaj.

Tiun ĉi vervon la movado ankoraŭ plifortigis en la jaro 1987, kaj kiu ne kredas tion, trafoliumu la jubilean libron de UEA. Fakte ĝi estas ne kroniko, sed kolekto de penseroj, de iam aperigitaj artikoloj, de partoj de paroladoj, de proponoj, de poemoj, kiuj komune formas buntan mozaikon de la multflankeco de lingvo kaj movado Esperanto. Kronike aldoniĝas dataro pri la historio de Esperanto, laŭlanda resumo de la jubileaj informlaboroj kaj amaso da fotoj. Tiel al la pretingintoj de la libro apartenas miloj da aktivuloj en multaj landoj, kaj por ili tekstige megafonis W. Auld, U. Lins, G. Waringhien, R. Harry ,Zhang Q., P. Daŝgupto, A. Duličenko, E. De Kock, L. Zaleski-Zamenhof, H. Tonkin, B. Ragnarsson, K. Perko, I. Lapenna, P. Neergaard,

J. Le Puil, J. Régulo, H. Mayer, C. Piron, M. Nervi kaj D. Blanke. Kaj M. Fettes (redakte kaj komentarie: **la paĝoj de ĉi tiu libro donas abundan pruvon, ke la komuneco de la Esperanto-parolantaro estas multe pli forta ol la diferencoj, kiuj foje disdividas ĝin**) kaj S. Milojević (antaŭparole: **Tiu revuo ne okazas por paradi. Ĝi celas konsciigi nin mem kaj sproni. Sproni por voji. Por pluvoji.**).
Tamen paradas fote optimismaj kongresaj vizaĝoj (paĝoj 81-96) el Varsovio respegulantaj la solenan etoson dum la kulmino de la jubilea jaro, paradas la t.n. esperantaĵoj eldonitaj en 1987, ateste heroldas scenoj el la kultura vivo en Esperantujo, kaj tiel revokas tutcerte multajn klopodojn, eventojn, komunajn tagojn en la memoron de la jubileintoj.
„Jubileo" komence poezias pri Esperanto kiel „mirinda miraklo", sed finas poezie per alvoko al „kuraĝo kaj obstino", kaj tiel relativigas la belan antaŭparolan frazon: **Se granda plimulto de la mondo ankoraŭ devas malkovri nian modelon, tio esence estas problemo pli ĝia ol nia.**

Ulrich Becker

Nemere„ Istvan: Dum vi estis kun ni. Romano. Budapest: Oy Mendoservo Ak kaj Hungara Esperanto-Asocio. 1988. 166 pĝ.

Tiu broŝura libro ne estas kriminala romano, sed psikologia kaj morala analizo. Estas pledo por homeca, hominda morto, kiun donas juna virino al sia malsanega patrino. Nemere, precipe konata kiel aŭtoro de aventuraj romanoj, per tiu ĉi verko ne sukcesis la transiron al realisma nuntempa rakontado.
La ĉefa rolanto estas juna prokuroro, kiu nun vivas en metropolo, sed plenkreskis ĝuste en la vilaĝo, en kiu la suspektata krimo okazis. Lia reveno al la vilaĝo, la renkontiĝo kun la propra patrino okupas larĝan spacon en la romano. Sed Nemere ne sukcesas profunde reliefigi siajn karakterojn kaj ne montras aŭ klarigas personajn evoluojn. La interparoloj restas surfacaj kaj afiŝecaj. La pridemandoj je la mortokazo ne sufiĉas por teni streĉon, kiu igus la leganton sekvi kun kreskanta atento la rakontan fadenon.
Eĉ la traktado de la esenca temo, nome de eŭtanazio, restas ligita al tiu unusola kazo kaj sekve unuflanka. La problemo ja ne limiĝas je medicinaj aŭ moralaj aspektoj. Mortohelpo ekde pluraj jardekoj havas plian dimension — de tiu tempo, kiam la nazioj donis „mortohelpon" al centmiloj da homoj, kiujn ili nomis „nevivindaj".
Do la lingve kaj stile senriproĉa romano estas leginda, sed enhave ankaŭ kritikinda.

Michael Lennartz

Lorjak: Mariagnes. Romano. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 220 p.

La teksto sur la kovrilo sciigas, ke temas pri plua varianto de la ofte pritraktita triangula amrakonto. Tio povus esti banala, kaj tiu informo certe ne sufiĉus por veki mian intereson. Sed la antaŭparolo promesas plue, ke „ĉio evoluas en la romano Lorjakece: vico de surprizaj eventoj, ridigaj scenoj, milda lirikeco spicita per ironio kaj memironio, sprita franca humuro, eleganta stilo . . .". Do mi riskis la legadon kaj konstatis, ke la antaŭparolo tute ne troigas! La libro estas tre flue skribita kaj kaptis mian atenton ĝis la lasta paĝo.

Jen koncize pri la enhavo: S-ro Mellion, emerita Pariza bankoficisto, kiu pasigas posemajne kelkajn vesperojn en ĥorgrupo, konatiĝas tie kun Maria Dupont, kiu envere estas la eksfama filmstelulino Agnes de Vitry. Li serĉas en Maria-Agnes la veran naturon malantaŭ la multaj sur ekrano prezentitaj roloj. La kreskanta intereso gvidas lin sur „glitvojon al enabismiĝo" (p. 83) kaj enamiĝinte li perdas ĉiun prudenton. S-ino Mellion, ankoraŭ laboranta vendistino, baldaŭ rimarkas la deflankiĝon de sia edzo, sed „ne havas ĵaluzan temperamenton" (p. 66). Ŝi esperas lian resaniĝon kaj kelkfoje eĉ fieras pri la fama amatino de la edzo. Nur poste ŝi decidas pli aktivi por regajni lin.

Krom tiuj ĉefaj personoj almenaŭ tri ege vigligas la agadon. Estas la petola filino de la gesinjoroj Mellion Persika, ŝia amiko Baltazar kaj ties frato Anatol. Ĉi-lasta klopodas, instigite de Persika kaj Baltazar, ege sed iom fuŝe pri s-ino Mellion, kio donas al la agado interesan turniĝon. La kulmino proksimiĝas, kiam la menciita Baltazar, studento pri teatrado, konatiĝas kun Agnes kaj ili komune ekzercas kelkajn scenojn el iuj amfilmoj. Ĉiuj agantoj per siaj ege diversaj, sed tipaj karakteroj kontribuas, por ke la leganto ne enuu kaj iliaj faroj pli kaj pli dense interplektiĝas. En la romano eĉ ne mankas interesaj kromfiguroj, ekzemple la filozofanta fervoja staciestro, kiu nur per citaĵoj de diversaj filozofoj plenumas tutnoktan konversacion. Tiel „Mariagnes" restas amuza ĝis la ege surpriza, sed por ĉiuj envolvitoj feliĉa fino, kiam solviĝas la granda enigmo de Mariagnes. Lingve al mi tre plaĉis la bone distingitaj nuancoj en la paroloj, ekzemple la monduma ĝentileco de Anatol, la komence seka ironio de s-ino Mellion kaj la sensacieca stilo de la skandalrevuoj. Iomete ĝenis min la ofta francismo „..., tial ke ..." anstataŭ „..., ĉar ..." laŭ la franca „parce que". Sed tio kaj eĉ kelkloke abundaj preseraroj (kiuj preskaŭ kutimas en la Esperantlingva literaturo) ne povis malfortigi mian ĝuon legi tiun libron.

Bernd Kuse

Erasmo de Roterdamo:
Laŭdo de l'Stulteco, tradukita el la latina de Gerrit Berveling, kun antaŭparolo de Humphrey Tonkin kaj enkonduko de Albert Goodheir. UEA, Roterdamo, 1988, 112 p. 30,00 gld.

Certe estis salutinda entrepreno, esperantigi tiun ĉi konatan verkon de la mondfama humanisto Erasmo de Roterdamo. La esperantigita eldono de „Stultitiae laus" aperis okaze de la 73-a Universala Esperanto-Kongreso en Roterdamo, kie naskiĝis la aŭtoro en 1466 aŭ 1469.
Erasmo estis unu el la plej eminentaj eŭropaj eruditoj de sia epoko. Li skribis latine, t.e. por la kleruloj kaj riĉuloj, sed li tamen simpatiis kun la simplaj homoj. Bone konante la vivon, li akre kritikis kaj severe atakis la fenomenojn de dekadenco en la socio.
Ĉar li ne povis malkaŝe diri, kion li pensis, li uzis la artan rimedon de fremdigo. En „Laŭdo de l'Stulteco" li personigas la stultecon. En la persono de virino, kiu agas sur scenejo, Stulteco diras, kion Erasmo mem ne estus povinta esprimi en iu ajn alia formo. Stulteco laŭdas sin mem kaj ‚pruvas' per multaj ekzemploj, ke ŝajna stulteco vere estas plej granda saĝeco.
„Laŭdo de l'Stulteco" estas rigardata la plej genia verko de Erasmo. Ĝi montras lian ampleksan klerecon interalie ankaŭ per multnombraj aludoj al la klasika literaturo kaj mitologio, kiuj ofte malfaciligas la komprenon. Por tio la nederlanda tradukinto, klasiklingva filologo kaj teologo, donas multajn valorajn notojn.
La stilo de la certe tre bona traduko estas eleganta kaj flua. Komparo kun la germanlingva eldono (Reclams Universal-Bibliothek, volumo 1023, tradukita de Heinrich Hersch) montras, ke la Esperanta versio estas konsiderinde pli mallonga (sen ellasoj). Stilaj apartaĵoj estas la tre ofta senpera verbigo de adjektivoj kaj la nekutima, sed permesata uzado de la prepozicio „ĉe" kun akuzativo.
Preseraroj mi trovis nur tre malmultajn, ekz. p. 23 sube „ĉiujn ĉe grekajn nomojn" anstataŭ „ĉiujn ĉi", p. 82 „kai" anstataŭ „kaj".
La libro prezentiĝas en tre plaĉa formo. Ĝi enhavas klarajn presliterojn sur glacea papero. Speciale ĉarmas min la originalaj desegnaĵoj de Hans Holbein la Juna.
Kiam Erasmo skribis tiun ĉi verkon, la erudiciuloj el la tuta mondo uzis la latinan kiel komunikilon. Post kvar jarcentoj sen tia unusola tutmonda lingvo, tiu ĉi esperantlingva versio denove estu legota de homoj el la tuta mondo. Ĝi servu kiel komprenilo inter la kulturoj, kion celas la Serio Oriento — Okcidento, en kiu ĝi aperis. Ni deziru al ĝi sukceson, konforme al la nomo de la aŭtoro, Desiderius Erasmus, kies ambaŭ partoj signifas ‚deziranto'.

Gerda Häusler

Rozo kaj glavo. Originalaj poemoj de bulgaraj esperantistoj (1906 — 1986). Antologio komp. de Canko Murgin, eld. de BEA. Sofia Pres 1987, 38 p.

La E-peozio en Bulgario, aperinta kvazaŭ kune kun la lingvo, dekomence ĝis nun fruktodonis ĉirkaŭ 350 originalajn poemojn resp. versaĵojn. El ili oni elektis 200 por ĉi tiu volumo.
Tra 80 jaroj eruditoj kaj pensemuloj priskribas sortojn ligitajn al batalo por la patrolando, por la popolo, kontraŭ subpremantoj, kontraŭ kapitalismo, kontraŭ faŝismo, por amo inter la homoj, por pli bona vivo en pli bona mondo. Enplektitaj en la bone reprezentitan ĝeneralan historian linion estas admiroj pri la naturo, himnoj por la patrino, suferoj kaj ĝojoj en la amo, ĉiutagaĵoj, filozofadoj, kaj ĉiam denove omaĝoj al Esperanto.
Poemoj estas kiel libroj, en kiuj oni pli aŭ malpli povas kaj devas foliumi kaj legi por sperti eldiron. Unuopajn temojn certe pli bone komprenas la popolo markanta per ĉi tiu kolekto sian vojon, sed entute resonas el ĉio ĝenerala homa sorto komprenebla ĉie en la mondo.
Georgi Mihalkov enkondukas la leganton per 13paĝa analizo pri E-poezio en Bulgario, dividas laŭ periodoj (1906 — 1918, 1918 — 1944, post la Dua Mondmilito), reliefigas rimarkindajn poetojn kaj ties verkojn.
La tuta libro estas dankenda kontribuo al la Esperanto-literaturo.

Monika Ludewig

Bestoj kaj iliaj patrinoj. Scienca rakonto por infanoj. Eld. Esperanto-Eldonejo Pekino. Teksto kaj ilustr. de Ĝjang Jiming. 18 paĝoj, 18 x 25 cm.

Jam la bele ilustritaj kovrilpaĝoj instigas trafoliumi la libreton. 17 bestospecoj estas prezentitaj. Klare kaj aminde la bestopatrinoj kun siaj idoj estas desegnitaj. Instruriĉe kaj interese, kiel diversmaniere la idoj estas gardataj kaj protektataj flanke de siaj patrinoj. La mallongaj bildotekstoj postulas sufiĉe bonan lingvokonon de la infanoj. La tekstoj estas rekomendindaj por instrui la akuzativon kaj por alkutimigi lernantojn al multaj prepozicioj.

Jana Zettier

Ni kore gratulas al

— **Vera Hinz** el Berlin, kiu festis rondan naskiĝtagon kaj estis distingita per la Honorinsigno de GDREA pro longjara kunlaboro en la oficejo.

— **Rudolf Zimmermann** el Dresden, iama membro de LEA, kiu festis ĉijare sian 85-an naskiĝjubileon.

Ni funebras

La 19an de julio 1989 forpasis en Timişoara docento d-ro **Cezar Apreotesei** (1922—1989), multjare pasia preleganto pri la Internacia Lingvo kaj ĉiuflanka apoganto de Esperanto, membro de la gvidantaro (vicestro) de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko en la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj de Rumanio.

Forpasis Honfan

Honfan (plumnomo de **Zhang Hongfan,** 1910 — 1989, honora konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj ĉefredaktoro de la granda „Esperanto-Ĉina Vortaro" aperinta en 1987, forpasis la 31an de julio. Li eklernis Esperanton en la tridekaj jaroj. En la unuaj de la kvardekaj jaroj, kiel instruisto kaj laboranto de la fama „Koresponda Esperanto-Lernejo" en Chongcing li multe laboris por E-movado per instruado, redaktado de Esperanto gazeto „Ĉina Esperantisto" k. a. Post la Nacia Liberigo, kiel unu el la fondintoj kaj redaktoroj de la Esperanta revuo „El Popola Ĉinio" li energie redaktis, verkis kaj tradukis (ekz. novelojn el la Ĉina Antologio", „Feliĉo" k. a.). Li ĉinigis interalie la faman „Historio de Lingvo Esperanto" de E. Privat. En la lastaj dek jaroj li plene sin dediĉis al redaktado de Esperantaj vortaroj kaj la jam aperinta granda „Esperanto-Ĉina Vortaro" ricevis altan takson de esperantistoj enlandaj kaj fremdlandaj, pre-

cipe japanaj. Antaŭ sia forpaso li estis redaktanta pli grandan laŭteman Esperantan vortaron.

El letero de ĉina leganto

S-ro **Ĉin Kajĝi** el Beijing skribis al **Rudolf Burmeister:** „Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis de vi ŝatatan vialandan E-revuon „der esperantist", en kiu aperis amika recenzo de d-ro **Erich-Dieter Krause** (Karl-Marx-Universitato, Sekcio pri Aziaj Lingvoj) pri la Vortaro. Mi donacis la E-revuon al s-ano Honfan kaj leginte la recenzon li esprimis grandan dankon la s-ano d-ro Erich-Dieter Krause kaj al la ŝatata E-revuo „der esperantist".

Aŭskultu E-radioprogramojn!

De tempo al tempo la redakcio publikigas sendohorojn kaj frekvencojn de unuopaj radiostacioj. Se vi ŝatus ricevi la kompletan liston kun ĉiuj stacioj disaŭdigantaj en Esperanto, bonvolu skribi al ni.

La red.

D-ro Ronald Lötzsch — nova prezidanto de GDREA

La 19-an de januaro 1990 en Neubrandenburg la Centra Estraro de GDREA elektis per sekreta baloto principe aplikante la elektoregularon de UEA novan prezidion.

De tri kandidatoj por la ofico de prezidanto de 36 voĉoj 22 voĉojn ricevis d-ro Ronald Lötzsch el Berlin. Li estas en GDR kaj internacie reputacia lingvisto (slavisto, lingvopolitikisto, leksikografo), en la Centra Instituto de la Akademio de Sciencoj de GDR. La du aliaj kandidatoj estis Hans Heinel (kiu malĉeestis pro severa malsano) kaj Manfred Arnold. Same sekrete estis elektitaj de la listoj de 10 personoj (unua baloto) kaj 4 personoj (dua baloto por unu loko) 6 pliaj membroj de la Prezidio. Ili estas Manfred Arnold kaj Joachim Schulze kiel vicprezidantoj, d-ro Detlev Blanke kiel sekretario (kiu ricevis 35 voĉojn de 36 eblaj) kaj Werner Pfennig, Ulrich Becker kaj Detlef Kraus.
Intertempe pro personaj kialoj (ŝanĝoj en la laborsituacio) Joachim Schulze redonis sian funkcion. La Centra Estraro sincere dankas al la iama prezidanto Hans Heinel, la vicprezidanto Rudolf Hahlbohm kaj la prezidianoj Siegfried Linke, Joachim Schulz kaj Torsten Bendias pro la farita laboro.

Spendet für GDREA!

Liebe Esperanto-Freunde!

Heute haben wir ein ganz besonderes Anliegen: Aufgrund der außerordentlich komplizierten finanziellen Lage, in der sich unser Land befindet, wird der Kulturbund seine finanziellen Mittel in erster Linie selbst erwirtschaften müssen. Das wird gleichermaßen für den Esperanto-Verband gelten. Mit den Mitgliedsbeiträgen sind die bisherigen Aktivitäten nicht zu realisieren.
Wir wollen aber trotzdem weitermachen, um wenigstens zu vermeiden, daß unsere gemeinsame jahrzehntelange mühevolle Arbeit, getragen von vielen Gruppen, Vorständen und zahlreichen einzeln agierenden Esperantisten, vom Tisch gefegt wird. D e s h a l b b e n ö t i g e n w i r j e t z t S p e n d e n ! Ihre Solidarität ist gefragt! Jede Spende ist willkommen — auch die kleinste. Jede Spende wird quittiert und in „der esperantist" veröffentlicht.
Über die Verwendung der Spenden wird der „Spendergemeinschaft" Rechenschaft abgelegt. Sollten Sie spenden wollen, so benutzen Sie bitte folgendes Konto: Postscheckkonto 7199—55—81087, codierter Zahlungsgrund 329—2814070. Stichwort: Spende. Dieses Konto steht vollständig und nur dem Esperanto-Verband zur Verfügung.
Wir sind ganz mutig und nennen Ihnen auch das Valutakonto unseres Verbandes. Denn wir brauchen moderne Bürotechnik, um die Streichung von Planstellen auszugleichen: Staatsbank der DDR 6651—53—30144, codierter Zahlungsgrund 329—80407, Stichwort: Spende. Auch testamentarische Zuwendungen sind denkbar.

ZV GDREA

Brandenburg vokas!

Kiel ni jam anoncis plurloke, la 5-a Centra Renkontiĝo de GDREA okazos inter la 25-a kaj 27-a de majo 1990 en Brandenburg. Ĝi estos certe grava forumo de diskutoj pri la estonteco de nia asocio kaj verŝajne la unua granda german-germana renkontiĝo en GDR. Tamen ni atendas gastojn el multaj landoj. La prezoj varios laŭ la dezirata kategorio (inter 90,— markoj por tranoktado en feria kabanaro kaj 210,— markoj en luksa hotelo). El la programo: **Vendredo:** Libroservo, gvidado tra la urbo, oficiala inaŭguro. **Sabato:** Prelegoj, forumo, diskutoj pri la novaj eblecoj por la Esperanto-movado internacia kaj enlanda, kunsido kaj prezentiĝo de fakgrupoj, prelegoj de eksterlandanoj, kultura vespero. **Dimanĉo:** Komuna ŝipekskurso sur la rivero Havel, kun muziko.
Por junuloj eblas aliĝi por ses tagoj (23-a ĝis 28-a de majo) kun aparta programo inkluzive de la programeroj de la ĉefa arangô. Prezoj inter 110,— kaj 145,— markoj por tri respektive ses tagoj kaj tranoktado en bona junulara gastejo.
Pluajn informojn donas la Centra Estraro: Esperanto-Verband im Kulturbund, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, DDR — 1080.

Sovetio

— Diljara Gadirova, **347922 Taganrog,** per. Nekresovskij, d. 3, kv. 4, dez. kor. tutmonde.
— Valentina Zaĥarova, **169706,** Komi ASSR, **Usinsk,** abon. jaŝĉik 55, dez. kor. tutmonde p.ĉ.t.
— 35j. instruistino dez. kor. pri lingvoj, literaturo: Galina Kuĉumova, **443 058 Kuibyŝev,** ul. Matrossowa 12, kv. 65
— Komencanto, 39j. matematikisto-programisto, dez. kor. pri historio, filatelio: Boris Michailez, **294 000 Užgorod,** ul. Gorkogo 84/3
— Leonid Mejevič, **446 202 Novokujbyŝevsk,** str. Molodogvardejskaja 7-72, dez. kor., kol. bk
— Presisto, 39j., dez. kor. tutmonde; kol. bk, gramofondiskojn: Viktor Docenko, **320 009 Dnepropetrovsk,** Kamĉatskaja 9-2
— 20j. studentino dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, historio; kol. pm, bk: Olga Samojlenko **340 045 Doneck,** Leninskij pr. 35/4
— Dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.:
  · Giedre Serbentavičiute, **232 040 Vilnius,** Švyturio 23-23
  · Agne Gedgaudaite, **232 051 Vilnius,** Zirmunu 44-234
— 15j. komencanto dez. kor. tutmonde: Malcjev Gleb, **326 520** Ĥersonskaja obl. **g.** Cjurupinsk, ul. Proletarskaja 71
— Anoj de la kolektanta klubo dez. kor. kaj interŝanĝi kun kolektantoj tutmonde. Adreso de la kluba prezidanto: Vladimir Kornijenko, ul. Narodnaja II-76, **220 107 Minsk**
— 31j. filologo dez. kor. pri muziko, teatro, arto, folkloro, turismo: Eduardas Malevičius, **233 000 Kaunas,** Raguvos 19-11
— Komencanto 15j., dez. kor. tutmonde pri E-novaĵoj, E-literaturo, muziko; kol. esperantaĵojn bk, pm: Vadim Čajkin, **328 520** Ĥersonskaja obl. **u. Cjurupinsk-1,** p. k. 24
— 32j. pedagogo dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, naturo; kol. pm. bk: Egidijus Vyŝniauskas, **235 052 Šlapaberže,** Kėddainiy raj.
— Svetlana Vladimirova, 15j., dez. kor. tutmonde pri klasika muziko, literaturo; kol. bk, kalendaretojn: pr. Mira 64-96, **o. Ust-Ilimsk-16**

Pollando

— Tomasz Popowski, str. Nowomiejska 19, **87-800 Włocławek,** dez. kor. kun geesp. el GDR; kol. pm, bk, urboplanojn.
— 28j. komencantino dez. kor. tutmonde pri montara turismo; kol. bk, librojn pri la temo „montaro": Joanna Morawiec, **42-253 Janów,** ul. Szkolna 4.
— 19j. komencanto dez. kor. kun geesp. el GDR pri turismo, literaturo, dancmuziko: Mariusz Korzeniewski, **09-213 Gozdowo,** str. Dwarowa 9, woj. płockie.
— 21j. komencantino, tajloristino, invalidino, dez. kor. kun geesp. el GDR pri poezio, muziko; kol. pm, bk; Stanisława Dziegiel, **24-132 Pozdg** 82, woj. Lubelskie.
— Beata Jagodzińska, Bul. M. Konopnickiej 32/14, **33-300 Nowy Sacz,** (17j.), dez. kor. tutmonde pri filatelio, turismo, geografio; kol. pm, bk.
— Instruistino, 26j. komencantino, dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, filmoj, muzikoj: Beata Mazur, Twardorzeczka 88, **34-324 Lipowa woj. bielskie.**
— Piotr Pieczyński, skr. poczt 13, **59-201 Legnica 3,** 19j., dez. kor. pri fotografado, filatelio.
— Mariusz Leśnikowski, ul. Zadworna 11, **42-122 Ostrowy,** 20j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.
— 23j. komencanto dez. kor. pri turismo, geografio, sporto, literaturo; kol. bk: Georgo Tomaszewski, **Hołuczków 50,** 38-535 Tyrawa Woł woj. Krosno.
— Em. instruisto, 65j., komencanto, dez. kor. tutmonde pri kuracbioenergio, kuracherboj: Jan Tybuszewski, ul. Klonowa 1, **76-270 Ustka.**
— 24j. elektroniko-studento dez. kor. pri turismo, informatiko, geografio, kol. bk: Rafał Stanek, os. Wysokie 4/42, **31-818 Kraków.**

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16